Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 25 — trimonata

2/95

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: Jozefo NÉMETH

Vicredaktisto: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunredaktintoj de la aktuala numero:
Stefan MacGILL, Monika MOLNÁR

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
H-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836 (hejma kun respondaparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

CHARTERS, Duncan: *La propedeŭtika valoro de Esperanto*..... 1
SMIDÉLIUSZ, Katalin: *La propedeŭtika valoro konkrete*.....4
LA TORRE, Mauro: *Instruika eksperimento esp*^{2}.....13
BISHOP, J.R.: *EKPAROLI*.....15
GOLDEN, Bernard: *Komplika transitiveco en Esperanto (II.)*..... 16
El la landoj kaj sekcioj.....21
Tago de la Lernejo (enkonduka teksto).....28
Ekzamena raporto '94, ekzamena kalendaro '95 (M.B. kaj I.B.B.).....28
UEA estrarkunsido (M.B.).....29
KURUCZ, Géza: *Konkursoj kiujn aprobis la praktiko(II.)*.....30
Tigre aŭ pigre al lingvo-lernado? (smg)..... 33
BELOŜEVIĈ, Marija: *ILEI kunsidis en Hamburgo*..... 33
OLSSON, Olle: *Stipendio por infanoj*.....35
Postparolo (J.N.).....36

Katalin Smidéliusz, nia vicredaktisto, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto (escepte julion kaj aŭguston). Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu.
En vere urĝaj kazoj vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. Ĝin sendu al la laborejo de la edzino de Jozefo Németh.
Ŝia adreso: *Némethné Varga Mária* (36-89) 324953

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu.
Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado.
Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*
Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb, Kroatio.Tel. (385 1) 576092.
Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52.
Financo, konferencaj financoj. Membraro.
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*
Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604.
Universitata agado.
Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528.
Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*
Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

La nunan numeron de la revuo ni dediĉas al la ĉi-jara konferenca temo, kiun enkonduku la kvar artikoloj de niaj kompetentaj kolegoj. *NdlR*

Duncan Charters

La propedeŭtika valoro de Esperanto

Unu el la plej konvinkaj argumentoj por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj per tiu rimedo en la pli vastan socion estas precize tio: ĝia "propedeŭtika" valoro. La zamenhofa vorto "propedeŭtiko" havas PIV-an difinon de "prepara, inica instruado", kaj la koncepto kutime rilatas al tia instruado kiu preparas la vojon por normala, efika alproprigo de difinita kapablo, lernmaterialo, aŭ studobjekto.

En tiu senco, do, la instruadon de Esperanto ni povas pravigi al la ekstera mondo tute aparte de ideologiaj demandoj rilate la valoron de la lingvo mem kiel internacia aŭ tutmonda komunikilo, kulturperilo, pacemigilo, ktp. Se Esperanto aparte valoras kiel unua paŝo al la akiro de fremdaj lingvoj por unulingvuloj, kaj se oni konsideras tion dezirinda celo en si mem, la sekva elekto de aldonaj argumentoj el nia kutima repertuaro povas esti utila aŭ malutila laŭ la difinitaj cirkonstancoj. Strategia demando ne neglektebla por nia komuna laboro kaj por ĉiu aparta okazo kiam la enkonduko de la lingvo estas reala ebleco.

Supozeble inter la esperantistoj ekzistas ne unuanima sed certe konsiderinda apogo de la ideo ke la plivastigo de la instruado de Esperanto estas utila celo, kiu valoras iom da investo de fortostreĉoj kaj eĉ movadaj financaj rimedoj. Ne pri movada strategio temas ĉi tiu artikolo, tamen necesas substreki ke kiom ajn valora ŝajnas esti iu specifa iniciato, ĝi ne nepre provizos panaceon por movadaj problemoj eĉ okaze de relativa sukcesa plenumiĝo. Se ni eksterdube demonstros la propedeŭtikan valoron de la lernado de Esperanto, necesos konvinki administrantojn de lernejaj programoj ke tiu paŝo estas praktika por iliaj specifaj situacioj. Se temas pri restrukturado de lerneja programo, trovado aŭ trejnado de kvalifikitaj instruistoj, financado de nova iniciato, jam la afero fariĝas pli komplika kaj tion oni devas anticipi. Tiu tamen estas tute ebla vojo, kiel montriĝis en diversaj kazoj en diversaj landoj.

Ĉu la nura enkonduko de Esperanto tra la propedeŭtika pordo estus sukceso? Oni povas diri ke evidente jes, almenaŭ el la vidpunkto de publika akcepto de Esperanto kiel normala, racia, natura elemento en la vivo kaj en la eduka sistemo. Tiu respondas al unu el la ĉefaj celoj de la movado: favorigi la publikan klimaton por serioza konsidero de la meritoj de la lingvo kaj ĝiaj pretendoj. Se temas pri la pli konkreta celo "enmovadigi" k.e.p. multajn entuziasmajn junajn adeptojn, ni konsciu ke tiu sekvo estas neniel aŭtomata. Se la instruistoj mem estus ekzemple trejnitaj lingvoinstruistoj kiuj komencus sian taskon ne pro konvinkiĝo sed kiel altrudita devo, se al la lernomaterialoj mankus ia ideologia enhavo, kaj se la lernantoj ne

vidus la praktikan valoron de la lingvo per daŭraj interesaj kontaktoj faciligitaj kun la mondo ekster la propra lernejo, la rezultoj povus esti praktike nulaj.

Pri tio avertas la rezultoj de la 25-jara eksperimento en la brita lernejo "*Egerton Park*", kies lernejestro, *Norman Williams*, estis konvinkita esperantisto kiu prizorgis kompetentan instruadon de la lingvo. Maksimume 2% el la lernintoj iam aktive eniris la movadon. Movadanoj pri tiu statistiko tamen ne estu pesimismaj. Gravis la valoro de tiu instruado mem pro la antaŭe dirita kialo, favorigo de la publika opinio pri Esperanto. Kaj ni havas hodiaŭ plurajn avataĝojn pri kiuj ne disponis la tiutempaj instruistoj: pli efikaj instrumetodoj, sonbendoj kaj vidbendoj, komputilaj programoj, kaj aparte la ebleco ligiĝi tuj kun aliaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo tra komputilaj retoj kaj aliaj rimedoj. Ni apenaŭ komencis utiligi tiajn rimedojn en la instruado de Esperanto, tamen ili ebligos motivadon kaj pli rapidan preparon de lernantoj por signifoplena utiligo de la lingvo por personaj interkulturaj kontaktoj.

La eksperimento *"Egerton Park"* provizas utilan materialon pri unu aspekto de nia temo. Dum tiu periodo oni kontrolis malsamajn grupojn de lernantoj, instruante al unu grupo dum unu jaro Esperanton kaj dum tri jaroj la francan, kaj al alia grupo dum kvar jaroj nur la francan. La rezultoj ĝenerale montris ke ne estis tempoperdo lerni Esperanton unue. Post la kvar jaroj, la kapablo pri la franca estis proksimume egala inter la du grupoj, kvankam la lernantoj kiuj ne havis apartan talenton pri lingvoj emis havi iom pli bonajn rezultojn se ili studis unue Esperanton. Kvankam eldoniĝis mallonga studo pri la eksperimento verkita de universitata psikologo *J. H. Halloran*, kun kies konservativaj konkludoj ne tute konsentis la lernejestro, la kondiĉoj de la eksperimento ne estis sufiĉe rigoraj por doni pli definitivajn konkludojn.

Kiel atentigis en 1984 *G. Lobin* dum la Vankuvera U.K., raportante pri sia studo de la ĝistiamaj eksperimentoj farita kiel parto de doktoriga laboro en *Paderborn*, kvankam oni povas citi ne malmultajn eksperimentojn pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, neniu el ili respondis al la rigoraj kondiĉoj kiujn oni postulas por pravigi eksterdube niajn asertojn. Ni nun havas pli da dokumentoj, kaj pli da profesiaj studoj pri tiu specifa temo kaj aliaj kiuj rilatas al ĝi. Tamen, venis la momento kiam por konvinki seriozajn personojn pri la valoro de niaj asertoj, estus utile starigi pli da eksperimentoj sub severe rigoraj kriterioj pri kiuj kunlaborus same severe objektivaj esploristoj.

Antaŭ jardekoj, oni kun granda espero atendis la efektiviĝon de kvinlanda eksperimento pri la instruado de Esperanto, kies aborton kaŭzis bedaŭrinde la malsaniĝo kaj morto de la pola ministrino pri edukado, la plej favora oficiala apoganto de la ideo. Nun ni espereble havos la eblecon ligi lernejojn en diversaj landoj kaj eĉ kontinentoj pere de la projekto *Fundapax*. Ankaŭ tia eksperimento povos doni la eblecon fari tiajn studojn, se oni atentos tiun bezonon de la komenco. En Usono oni nun esploras tiajn iniciatojn malgrandskale pro pli granda interesiĝo inter lernejoj kaj esploristoj. Nur en la nuna generacio en Usono oni komencis pli serioze atenti la utilon enkonduki la lernadon de dua lingvo jam en la elementaj

lernejoj, sed restas preskaŭ nesolvebla problemo trovi adekvate preparitajn instruistojn de kiu ajn fremda lingvo je tiu nivelo. Kiam oni starigas unuafoje tian programon en granda lerneja sistemo, oni preskaŭ neeviteble devas peti enmigran permeson por instruistoj el aliaj landoj. El tute objektiva vidpunkto, havas grandan sencon enkonduki la instruadon de Esperanto je tiu nivelo kiel preparon por la eklerno de fremda lingvo en la postelementa lernejo. Lernejestroj kaj administrantoj de programoj pri fremdaj lingvoj komprenas kaj respektas tion.

Ekzistas en Usono proksimume 200 esplorstudoj, laŭ kiuj oni povas konkludi ke aldoni la lernadon de lingvo en elementlerneja programo neniel forprenas de la rezultoj kiujn oni atingas en la lerneja programo kiel tuto. Preskaŭ ĉiuj studoj indikas, ke pliboniĝas la lernantoj en aliaj studobjektoj pro la valoro de tio kion oni lernas kiam oni studas lingvon. Nur kelkaj indikas ke estas neniu diferenco. Neniu el ili indikas ke la lernado de lingvo kaŭzas malpli bonajn rezultojn en kiu ajn aspekto de la lernado, malgraŭ tio ke lingvolernado necese forprenas tempon de io alia. Tamen la kutimaj burokrataj problemoj bremsas ŝanĝojn en la situacio. La fakto ke ĉiuj esplorstudoj indikas la saman, de multaj neatenditan, rezulton estas tute malofta, kompreneble. Tio kaŭzas, tamen, ke la ŝanco por Esperanto estas bonega se oni povas demonstri ke la lernado de la lingvo donas minimume egale bonajn rezultojn kiel tiu de tipa fremda lingvo. Kaj efektive oni povas supozi, ke la rezultoj estus pli bonaj pro la konataj kialoj, antaŭ ĉio ĝia praktika ekuzebleco post multe malpli longa tempo. Krom tio, trejni elementlernejan instruiston por instrui Esperanton estas eble. Fari la saman pri kiu ajn fremda lingvo, por instruisto sensperta pri tiu lingvo, estas apenaŭ pripenseble.

Do kiam ni pritraktos en la Finnlanda konferenco de ILEI kaj poste la temon de la propedeŭtika valoro de la instruado de Esperanto, ni atentu la bezonojn de tiuj kiuj laboras por konvinki lernantojn, gepatrojn, instruistojn, kaj administrantojn ke valoras serioze konsideri la solvon kiun prezentas Esperanto. Rigore fundamentitaj esplorstudoj pri tiu valoro helpos konvinki lernejajn administrantojn, kaj la fakulojn kiujn ili neeviteble konsultos kiam temas pri ideo kiu ankoraŭ ne fariĝis populara en edukaj rondoj. Kaj krom tio, ni provizu al niaj laborantoj en la eduka kampo bone verkitajn prezentojn de la faktoj pri la valoro de Esperanto por iliaj edukaj celoj. Ni ne bezonas troige fanfaroni. Eĉ sen esplorstudoj, la argumentoj kiujn ni povos nun prezenti surbaze de niaj jamaj spertoj povos esti tute konvinkaj se ili estas ellaboritaj kun inteligento kaj komprenemo de la nuntempaj edukaj bezonoj. Ni plue esploru, sed ni certiĝu ke ni faris sufiĉe por evidentigi al aliaj tion, kio jam estas por ni unu el la plej memevidentaj avantaĝoj de la instruado de Esperanto: enkonduko al vasta mondo de komunikado kaj komprenemo ekster la limigita bazo de la gepatraj lingvoj, naciecoj, kaj kulturoj.

Katalin Smidéliusz

La propedeŭtika valoro **konkrete**

La fakto, ke Esperanto rolas bone kiel enkonduka lingvo, jam estas agnoskita ankaŭ de pluraj ekstermovadaj fakuloj. Laŭ miaj spertoj estas tre utile, se la ĝeneralajn asertojn ni esperantistoj povas rekte pruvi per konkretaj analizoj kaj komparaj studoj ankaŭ eksterkomunume . Kiel metodikisto en pedagogia altlernejo, mia tasko estas eduki fremdlingvajn instruistojn, instrui al ili ĉiujn trukojn por plifaciligi la akirigon de la unua ne-nacia lingvo al infanoj inter 7- kaj 10-jaraj. Miaj studentoj ofte estas ŝokitaj pro la kvanto de diversaj elementoj pri kiuj ili devas atenti planante kion, kiam, laŭ kiu sinsekvo prezenti dum la instruprocezo.

La enlingvajn interferojn en nia kazo signife superas dum la unua periodo la interlingvaj diferencoj. La malsimileco de la lingva strukturo de nia nacia lingvo de ĉiuj aliaj instruataj lingvoj en Hungario donas la unuajn plej gravajn taskojn por niaj lingvoinstruistoj.

Juna lernanto de fremda lingvo - en kies gepatra lingvo mankas la prepozicisistemo (ĝian funkcion transprenas postpozicioj kaj gramatikaj finaĵoj ofte kun 2-3 alomorfaj variantoj por akordiĝi ankaŭ kun la vokala sistemo de la vorto); en kies lingvo ne ekzistas genra distingo, nek tia nek laŭnumera akordigo ene de la nominativa sistemo; kie unu nomvorto krom kazo (el kio ni havas minimume 17 kun ĉ. 900 kazofinaĵoj) kaj numero povas indiki ankaŭ la posedanton; en lingvo kiu ĵonglas per pli ol 1500 afiksoj; kiu forte markas akuzativon kaj pro tio estas libera se temas pri vortordo; kies vortprovizo estas tute fremda al la eŭropa kulturo - devas alfronti amason da strangaĵoj kiam faras siajn unuajn paŝojn en iu ajn lingvo de la indoeŭropa lingvofamilio.

La bezono havi lingvon, kies strukturoj ja necese estas diversaj de la gepatralingvaj kutimaj strukturoj, sed kiu almenaŭ ne estu "superflue" komplikita (ekzemple per intergenra distingo, malfacile memoreblaj konjugacioj kaj deklinacioj) kreiĝas en ĉiu lingvolernanto, sed multe pli forte en la konsciaj lingvoinstruistoj.

La revon pri iu tia lingvo mi ĉiam sukcesas veki ĉe la studentoj dum miaj lekcioj kaj seminarioj. Por esti konvinka ne sufiĉas supraĵaj ekzemploj, oni bezonas - kaj ni havu! - science prilaboritan materialon.

En la jaro 1994 mi verkis diplomlaboraĵon en la itala lingvo pri la propedeŭtika valoro de Esperanto[1], favora al la instruado de la itala lingvo al hungaraj infanoj. En la nuna jaro la laboraĵo estas kompletigita kaj la hungarlingva doktoriga disertaĵo pri la sama temo jarfine defendota ĉe la katedro pri la itala lingvo kaj literaturo en budapeŝta universitato. Krom la graveco de la temo mi opiniis tre necese okupiĝi pri tiu studo ankaŭ ekster nia movado kaj ankaŭ tiel agnoskigi la - de ni esperantistoj bone konatajn - valorojn de la internacia lingvo.

La disertaĵo post la enkonduko pritraktas la gravecon de enkonduka pontolingvo, la psikologiajn kaj lingvajn valorojn de propedeŭtika lingvo kaj aludas al kelkaj jam konataj internaciaj eksperimentoj. Por science pruvi, ke Esperanto vere antaŭpreparas la vojon por la itala lingvo unue mi devis difini tiun itallingvan materialon,

kiun mi deziras alproprigi al la infanoj ĝis la 12a jaraĝo. Estas listigitaj la lernendaĵoj laŭ la parolintencoj kaj komunikbezonoj, necesaj gramatikaj niveloj kaj lingvaj strukturoj, leksikaj temoj kaj instruendaj parolturnoj.

La vera ĉefparto komenciĝas per detala lingvistika analizo de Esperanto. Laŭ la hipotezo Esperanto estas la unua fremda lingvo (L_2) por la infanoj, do ĝi estas analizata tra la lenso de la gepatra hungara lingvo (L_1) kaj la itala, la dua fremda (cel-) lingvo (L_3). La komparaj studoj disvolviĝas nur je tiu lingva nivelo, kiu necesas por alproprigi la antaŭprogramitan instrumaterialon ĝis la menciita jaraĝo.

La studo aparte atentas pri la objektive ekzistantaj lingvaj interferoj kaj ties transformo je pozitivaj transferoj. Surbaze de tiu kompara analizo estas difinebla la esperantlingva materialo kiu efike povas prepari la gramatikan kaj leksikan grundon por la postaj studoj de la itala lingvo. Krom la gramatikaj kaj lingvaj strukturoj necesis elekti ankaŭ la vortostokon, aplikendan dum la propedeŭtika fazo kaj dum la posta itallingva komenca periodo.

Surbaze de la leksika analizo kaj lingva komparo mi kompilis itallingvan teston, baziĝantan sur identaj kaj similaj elementoj de la itala lingvo kaj Esperanto kaj solvigis ĝin ĉe pli ol cent hungaroj, lernantaj minimume de duonjaro la internacian lingvon kaj nekonantaj la italan.

La rezultoj de tiu enketo pruvis multajn punktojn de la hipotezo. La gravecon de la tuta studo mi vidas en tio, ke ĝi ne ĝenerale deklaras, ke Esperanto havas propedeŭtikan valoron en la alproprigo de fremdaj lingvoj, sed konkrete analizas pri kiuj elir- kaj cellingvoj temas. La grado de la propedeŭtika valoro de Esperanto unuavice dependas de la koncernaj lingvoj.

Kompreneble sen tia distingo inter la lingvoj ekzistas ankoraŭ alia pozitiva valoro de "enkonduka lingvo", ja pro la simpleco, logikeco kaj reguleco de Esperanto infano, eklernanta sian unuan fremdan lingvon - sen renkonti ĝenajn obstaklojn - en Esperanto trovas bone uzeblajn skemojn, kiuj sufiĉe rapide ebligas al li esprimi siajn bezonojn en iu nova kodsistemo. La intelekta malkovro pri la funkcio de lingvosistemoj - kaj konsciiĝo pri la propra, ĝis tiam senkonscie uzita - havas sian psikolingvistikan valoron, absolute sendependan de la lingvaj strukturoj kaj leksikoj. Tiu pozitivaĵo konstateblas kaj sendube pruveblas en ĉiu kazo, rilate iun ajn lingvon.

Ne tiel en la alia, lingvistika tereno. La ĝeneraligo, ke Esperanto multe povas helpi la lernadon de alia fremda lingvo, jam postulas konkretigojn kaj pruvojn.

La grado de tiu helpo malsamas: se ekzemple hungaro volas lerni unu el la itala, germana, japana aŭ rusa lingvoj, aŭ italo volas lerni la francan, anglan aŭ hungaran lingvon. Ju pli malsamas la gepatra lingvo (L_1) kaj la cellingvo (L_3), kaj ju pli similas Esperanto al la cellingvo, des pli granda estas la propedeŭtika valoro. (Ekzemplo al tiu ĉi kazo: kiam hungaro volas lerni la italan lingvon). Lingvistike ne tiom utilas, se la gepatra lingvo tre similas al la cellingvo kaj Esperanto fremdas al ambaŭ (kiam ruso volas lerni la polan lingvon).

Ĉiu kazo bezonas apartan analizon, dononta diversajn rezultojn, -kaj ĉu estas dolorige? - la profito ne ĉiam altas, ne ĉiam konvinkas pri la valoro de investoj (tempaj kaj financaj).

Al pedagogoj, kiuj instruas Esperanton (ankaŭ) propedeŭtikcele utilus konsciiĝi pri la konkretaj valoroj, pri pozitivaj kaj negativaj transferoj, renkonteblaj dum la instru- kaj lernoprocezo. Tiucele en la jena artikolo mi prezentas la resumon de du partoj el mia disertaĵo, kun la espero doni ideojn por la programigo de la instrumaterialo kaj kompara analizo de lingvaĵoj.

Gutoj el la leksika analizo

Por science elekti la vortprovizon oni nepre atentas kelkajn principojn, el kiuj mi prezentas nur la du plej gravajn: la oftecon de la koncernaj vortoj kaj la laŭcirkonstancajn bezonojn de la lingvouzontoj.

La laŭcirkonstance kompilita vortprovizo dependas de multaj faktoroj de la instruprocezo, interalie de la aĝo kaj intereso de la lernantoj, de la (geografia) loko de la instruado, de ties celoj, ktp. Por akiri tiun ĉi materialon ni enketis ĉe pli ol cent infanoj de la koncerna aĝo kaj skribigis al ili 8-10 vortojn laŭ diversaj temoj. Fakte la tuto baziĝis sur asociado pri la menciitaj temoj, t.e. ili surpaperigis vortojn, pri kiuj ili unue pensis aŭdinte la temojn: personoj, bestoj, hejme, en la lernejo, sur la strato, manĝaĵoj-trinkaĵoj, agoj, kvalitoj, ŝatokupoj, ktp. El la tiel ricevita listo la plej oftaj eniras la studmaterialon ĝuste por kontentigi la bezonojn de la lernantoj, ja la lingvoinstruado celu evidentigi iliajn komunikbezonojn. Kompreneble ankaŭ ĉikampe eblas iom da manipulado, ja por la samaj nocioj en la lingvoj ofte troviĝas sinonimoj, do la instruisto rajtas elekti la pli oftan version, la pli simplan gramatike aŭ fonetike, aŭ tiun kiu el aliaj vidpunktoj pli taŭgas, ekz. similas al la nacia lingvo aŭ al alia, jam lernita.

La vortprovizon de iu studoprogramo devas konsistigi vortoj, elektitaj laŭ objektivaj kriterioj, kiel estas ekzemple la ofteco de la vortoj en la cellingvo. Por kompari kun la Esperantaj variantoj la unuajn mil plej oftajn vortojn de la itala lingvo mi ĉerpis tiujn el la frekvencolisto de Sciarone[2] kaj laŭ memelektitaj vidpunktoj por trovi la identajn, similajn kaj malsimilajn vortojn mi grupigis la komparitajn vortolistojn. La ricevita rezulto estas tre interesa kaj konvinke favora al mia hipotezo. La analizo liveras ne nur leksikon por plani la studmaterialon, sed samtempe helpas elekti kiujn vortojn enigi en la Esperantan programon kaj kiujn eviti pro la interlingvaj interferoj. Ankaŭ alian utilon povas havi la preparita analizo, ja ĝi estas kolekto ankaŭ de falsaj amikoj, utila al instruistoj pri Esperanto al italoj kaj inverse.

1.Identeco

Grupigante la unuajn mil vortojn sub la unua ĉefgrupo mi kolektis la vortojn kiuj montras identecon inter si en la du fremdaj lingvoj. Tiu ĉi identeco povas esti absoluta kaj parta kiel videblas el la sube donitaj kelkaj ekzemploj. El metodika vidpunkto la identeco kaŭzas pozitivan transferon en la lingvolerna procezo.

1.1. Identas la skribaj formoj, la prononco, akcento kaj signifokampo.

	Itala	*Esperanto*	*Hungara*
113*	mano	mano	kéz
127	momento	momento	pillanat
128	modo	modo	divat, mód
133	mondo	mondo	világ
258	senso	senso	érzék

1.1.1. La formo, prononco kaj akcento de ĉiuj vortoj estas identaj, nur la vortfinaj literoj malsamas.

18	fare	fari	csinálni
25	dire	diri	mondani
32	altro	altra	másik
34	vol/ere	vol/i	akarni
37	stare	star/i	állni
43	ven/ire	ven/i	jönni
58	grande	granda	nagy
85	parte	parto	rész

1.1.2. La identaj vortoj formas falsajn amikojn se en la signifokampo estas diferenco inter la formoj, kiel ĉe la subaj ekzemploj.

12	da	de	-tól, től
	di	da	-nyi, részelő
91	tempo	tempo	idő
	tempo	vetero	időjárás
153	stato (situazione)	stato	állapot
	stato (comunità)	ŝtato	állam
269	posto (luogo)	posto	hely
	posto (impegno)	posteno	poszt
323	studio (televisivo)	studio	stúdió
	studio	studo	tanulmány
171	strada	strato	utca
	strato	tavolo	réteg
826	tavola	tablo	asztal
	tavolo	tablo	asztal
	lavagna	tabulo	tábla

1.2. Identas la skribitaj formoj de la Esperantaj kaj italaj vortoj, sed estas diferenco en la prononco. Tiu simileco signife helpas la komprenon de skribita teksto.

* La antaŭvorta cifero indikas la pozicion de la koncerna itala vorto en la frekvencolisto de Sciarone.

1.2.1. La prononc-diferencon kaŭzas la malsamaj ortografiaj kaj fonologiaj reguloj de la koncernaj lingvoj.

106	certo [*ĉerto*]	certa	biztos
376	decid/ere [*deĉidere*]	decid/i	elhatározni
393	ricev/ere [*riĉevere*]	ricev/i	kapni
375	centro [ĉentro]	centro	központ
775	gesto [ĝesto]	gesto	gesztus

1.2.2. La prononc-diferencon kaŭzas la malsamaj akcentoj.

295	n*u*mero	num*e*ro	szám
320	p*o*polo	pop*o*lo	nép
385	v*a*rio	var*i*a	változatos
412	l*i*bero	lib*e*ra	szabad
471	sp*i*rito	spir*i*to	szellem

1.2.3. La prononco identas, sed la skribita formo malsamas pro la malsamaj ortografiaj reguloj. En tiu ĉi kazo la pozitiva transfero estas rimarkebla dum la kompreno de aŭdita teksto.

109	cred/ere	kred/i	hinni
155	caso	kazo	eset
181	voce	voĉo	hang
187	acqua	akvo	víz
195	amico	amiko	barát
287	caro	kara	drága, kedves

1.2.4. La prononco kaj akcento de la subaj vortoj identas, sed ne ilia skriba formo, nek la signifo.

224	testa	kapo	fej
234	capo	ĉefo	főnök
726	carne (vivente)	karno	élő hús
	carne (cibo)	viando	hús (étel)
679	lingua (parlata)	lingvo	nyelv (beszélt)
	lingua (organo)	lango	nyelv (testrész)
774	viso	vizaĝo	arc
	visto	vizo	vízum

1.2.3.1. La prononcitaj formoj identas, nur la akcento kaŭzas diferencon kaj samtempe fortan negativan transferon.

329	pol*i*tico	polit*i*ka	politikai
345	*u*nico	un*i*ka	egyedüli
461	econ*o*mico	ekonom*i*ka	gazdaságos
789	p*u*bblico	publ*i*ko	közönség
974	chil*o*metro	kilom*e*tro	kilométer

2. Simileco

La duan subgrupon formas la vortoj ĉe kiuj rimarkeblas simileco en la radikoj, sed intervenas mutacio, ŝanĝiĝo(j). Tiuj vortoj pro la rekonebleco helpas la komprenon, sed postulas grandan atenton kaj zorgadon en la aktiva lingvouzo. Sen la intenco pritrakti ĉiujn trovitajn kazojn staru ĉi tie kelkaj karakterizaj fenomenoj.

2.1. La Esperantaj vortoj suferis fonologian mutacion.

11	si	sin (si+n)	magát
26	mi	min (mi+n)	engem
29	anche	ankaŭ	is
49	due	du	kettő
60	uomo	homo	ember
62	molto	multe	sok
74	parl/are	parol/i	beszélni
101	nuovo	nova	új
116	buono	bona	jó

2.1.2. Vortoj, suferintaj fonetikajn ŝanĝojn kaŭzas negativajn interferojn.

2	di	de	-nak a, nek a,
	da	de	- által
15	per	por	- val, -vel
16	con(strumento)	per	
	con	kun	
108	passare	pasi	(el)telni
	passare	pasigi	eltölteni

2.2. Ofte rimarkeblas, ke unu el la vortoj ricevis afikson.

2.2.1. Sufikson havas la itala vorto.

139	italiano	italo (itali-an-o)	olasz
268	ordine	ordo	rend
304	pensiero	penso	gondolat
343	condizione	kondiĉo	feltétel

2.2.2. Sufikson havas la Esperanta vorto.

252	signora	sinjor/in/o	asszony
328	figlia	fil/in/o	lánya vkinek
548	unire	unu/ig/i	egyesíteni
570	libertà	liber/ec/o	szabadság

2.3. La simileco originas en etimologia parenceco, plej ofte la komunaj fontoj estas latindevenaj.

3	essere	esti	lenni
28	potere	povi	képesnek lenni
38	dovere	devi	kelleni
88	vita	vivo	élet
1 46	padre	patro	apa
211	amore	amo	szerelem

2.4. La duoblaj konsonantoj malaperas en la Esperantaj versioj.

2.4.1. Unu el la du malaperas.

24	tutto	tute	teljesen
95	bello	bela	szép
102	mettere	meti	rakni
337	accordo	akordo	egyetértés

2.4.2. Unu el la du malaperas, la alia ŝanĝiĝas.

175	notte	nokto	éjszaka
203	fatto	fakto	tény
241	trattare	trakti	bánni vkivel

2.4.3. La longa itala konsonanto transformiĝas je unu alia en la Esperanta vorto.

301	braccio	brako	kar
396	permettere	permesi	megengedni
400	passo	paŝo	lépés
405	ricco	riĉa	gazdag

2.4.4. Vortoj kiuj suferas du ŝanĝojn.

117	occhio	okulo	szem
231	correre	kuri	futni
249	appena	apenaŭ	alig
285	letto	lito	ágy
286	apparire	aperi	megjelenni

2.4.5. Vortoj, kie falas la duobla konsonanto, sekve la Esperanta versio ĉu mallongiĝas, ĉu ricevas alia(j)n konsonanto(j)n, aŭ suferas modifojn.

161	troppo	tro	túlságosan
911	otto	ok	nyolc
922	sette	sep	hét
806	espressione	esprimo	kifejezés

2.4.7. Interesan grupon formas tiuj vortoj, ĉe kiuj ŝajne estas neniu komuna inter la Esperantaj versioj kaj tiuj, kiuj aperas en la frekvencolisto. Tamen post atenta analizo, troveblas itala sinonimo kies parenceco kun la Esperanta vorto estas okulfrapa. Kelkfoje temas pri derivitaj vortoj en Esperanto.

48	cosa	afero	(¬ affare)	dolog
71	primo	unu/a	(¬ uno)	első
134	tornare	re/ven/i	(¬ venire)	visszatérni
138	capire	kompren/i	(¬comprendere)	érteni
154	piccolo	mal/grand/a	(¬ grande)	kicsi


3. Malsimileco

La trian grupon formas la vortoj, inter kiuj mi ne trovis similecon. Ties Esperanta versio devenas ekzemple el aliaj lingvo(familio)j. El metodika vidpunkto ili ne helpas la komprenon, sed ne malhelpas la aktivan lingvouzon. Ofte estas pli bone uzi tiajn vortojn ol facile mikseblajn, similajn vortojn.

56	anno	jaro	év
64	giorno	tago	nap
73	volta	fojo	alkalom
81	casa	domo	ház
110	donna	virino	nő
126	paese	lando	ország

Konkludo

Post la komparo de la 1000 plej oftaj italaj vortoj kun ties esperantlingvaj ekvivalentoj mi konstatis, ke 22 % montras identecon (kompletan 13 %, partan 9%), inter la vortoj de la du lingvoj 48 % montras similecon kaj 30 % havas nenion komunan.



Neforgesante, ke inter la similaj vortoj parto nur skribe similas, parto nur prononcite, ni tamen povas konkludi, ke el la vidpunkto de vortprovizo la itala lingvo kaj Esperanto signife helpas la komprenon unu de la alia.

La grandprocenta simileco atentigu la lingvoinstruistojn pri la fakto, ke la efiko de la simileco estas subjektiva afero, kelkaj kaŭzas ĉe la lernanto pozitivan, aliaj negativan transferon, dum ĉe alia lernanto ili efikas alimaniere. Precipe en la produktiva lingvouzo (skribo, parolo) ni kalkulu je la negativa, bremsa transfero de similaj vortoj.

Kio krom la leksiko?

Por pruvi, ke ne nur la leksika simileco havas grandan rolon, estis kompilita de mi testo, kiu - helpe de identaj kaj similaj vortoj en Esperanto kaj itala lingvoj - enhavis laŭgrade malfaciligitajn itallingvajn frazojn. La celo estis pruvi, ke la kono de Esperanto ebligas kompreni frazojn de tute nekonata lingvo. Hungaraj esperantistoj, pretaj partopreni en la eksperimento ricevis interalie la sube troveblajn italajn frazojn kun la tasko traduki ilin al la gepatra lingvo.

La enketado liveris interesajn rezultojn, pruvis la elirhipotezon, sed aldone starigis interesajn demandojn, metodike neneglektendajn.

La analizon de tiu ĉi ekzameno vi povos legi en la sekva numero de nia revuo.

Ĝis tiam, se vi mem deziras provi kiomgrade vi estas helpata de Esperanto por kompreni la italan lingvon, vidu la duan paĝon de mia esplorenketo, kiun vi povas traduki aŭ al Esperanto aŭ al via nacia lingvo.

Provu traduki la sekvajn itallingvajn frazojn!

a) Il libro è interessante. .....
b) Il mio amico è italiano. .....
c) Il poeta riposa. .....
ĉ) La mia mamma sabato non lavora. .....
d) Il ministro saluta il pubblico. .....
e) Maria non ha tempo libero. .....
f) Paola frequenta la sesta classe. .....
g) Il mio papà lavora in una fabbrica. .....
ĝ) Marianna parla bene la lingua italiana? .....
h) Il fratello di Paolo dorme. .....
ĥ) La grammatica di Esperanto è facile. .....
i) I turisti visitano i famosi musei di Roma. .....
j) Il signore si lava con sapone. .....
k) Luigi preferisce l'insalata al formaggio. .....
l) Il direttore deve pagare molto al suo dottore. .....
m) Il professore non vuole finire la lezione. .....
n) La signorina Verdi desidera vendere la villa contro un prezzo alto. .....
o) Chi ama Carlo? .....
p) Con chi parla Maria? .....

El la sekvaj vortoj konstruu frazojn en la itala lingvo!

casa, Marco, la, è, di, moderna : .....
lunga, scrive, Paolo, lettera, una: .....
ragazza, si, la, veste, semplicemente: .....
professoressa, non, la, ministro, invitare, vuole, il: .....

Viaj reagoj, solvoj kaj alilingvaj similcelaj fraz-aroj estas bonvenaj en la redakcio.

Notoj:

1. Smidéliusz K.: L'Esperanto come strumento propedeutico nell'insegnamento dell'italiano per gli ungheresi. Instituto Superiore di Magistero Berzsenyi Dániel, Dipartimento di Italianistica, Szombathely, 1994.

2. Listo de frekvenco de A.G. Sciarone, kompilita ĉe la Katedro de Aplikata Lingvistiko de la Universitato de Delft, Nederlando. (Sciarone: Vocabolario Fondamentale della lingua italiana, Minerva Italica, 1977. p. 167-196)

Mauro La Torre

Instruika eksperimento esp[2] (1)

Ĉiam pli ofte oni proponadas la instruadon de la Internacia Lingvo pro sia propedeŭtika valoro. En la menso de multaj fidelaj propagandantoj kaj entuziasmaj kurs-organizantoj tiu adjektivo aldoniĝas al la vico de la tradiciaj ecoj de nia lingvo - facila, belsona, neŭtrala, vere internacia, ..., propedeŭtika - kaj ĝi emas esti ĉiam pli uzata en la propagandiloj pro sia scienceca aspekto. Sed ni haltu momenton, por pripensi, kiu signifo precize kuŝas sub la greklingva formo de tiu moda vorto. Propedeŭtikeco estas eco de iu lernaĵo, kompare kun alia. Oni diras ke: la lerno de X estas propedeŭtika por la lerno de Y. Alivorte: la lerno de Y antaŭsupozas la lernon de X. La termino uzatas ĉefe en la jura nuanco, ekzemple ĉe la prezento de universitataj instruplanoj, kiam oni diras ke vi ne rajtas aniĝi en kurso Y, se vi ne jam superis la ekzamenon X (kiu estas propedeŭtika). Memkompreneble la kialo de tiaj juraj normoj estas ke la scio de X faciligas la lernon de Y. Do ni povas diri ke el klerigscienca vidpunkto propedeŭtikeco signifas lern-faciligon. Tamen, se laŭ la instituci-norma optiko sufiĉas paroli pri X kaj Y kiel kursoj kun respektivaj ekzamenoj (ekz.: la ekzameno pri Ĝenerala Kemio estas propedeŭtika por la ekzameno de Organika Kemio), male, en la instru-scienca perspektivo oni prefere rigardas kurson kiel ujon, en kiu enestas multaj diversaj kapabloj - aŭ pli bone kiel procezo, kie rolas pluraj variabloj - kiuj estas unuope (aŭ kune) kontrolataj per la fina ekzameno. Ekzemple en kurso pri lingvo L, je nivelo N, oni lernas (aŭ devus lerni) ioman vortprovizon V, aron da gramatikaj strukturoj G, kaj tiel plu.

Revenante al nia komenca temo, la propedeŭtikeco de Esperanto, por ke ĝi ne estu nur propaganda slogano, sed ĝi estu ankaŭ science kontrolebla aserto, necesas reformuli la eldiron per pli precizaj terminoj.

Unue: kiam oni asertas ke la lerno de Esperanto havas propedeŭtikan valoron por la lernado de aliaj lingvoj, la eldiro resumas aron da tezoj, kiaj

T(C1): la lerno de Esperanto plifaciligas la lernon de lingvo C1
T(C2): la lerno de Esperanto plifaciligas la lernon de lingvo C2
T(C3): la lerno de Esperanto plifaciligas la lernon de lingvo C3,
.....

Ĉu ni certas ke la faktoj T(C1), T(C2), T(C3), ... same veras? Se ne, oni konsideru aparte tiujn diversajn tezojn.

Due: kion ni subkomprenas pri la gepatra lingvo de la lernantoj? Ĉu la faciligo, kiun Esperanto povas doni al japanaj lernantoj rilate la postan lernadon de la itala, samkvantas kun la helpo, kiun israelaj (hebro-lingvaj) lernantoj povos ricevi de Esperanto por la lernado de la araba? Sed se ni dubas pri tio, t.e. pri la fakto ke la gepatra lingvo estas indiferenta, do ni devas plurobligi la supre listigitajn tezojn T(C1), T(C2), ... jene:

T(G1, C1): por la lernantoj, kies gepatra lingvo estas G1, Esperanto plifaciligas la lernon de lingvo C1,
T(G2,C2): por la lernantoj, kies gepatra lingvo estas G2, Esperanto plifaciligas la lernon de lingvo C2,
.....

Trie: ĉiuj scias, ke lingvo-kono estas sinteza esprimo, kiu resumas multajn diversajn lingvajn kapablojn (fonologiaj/sintaksaj/semantikaj...; pasivaj/aktivaj; ktp.). Ĉu la lernfaciligo, kiun la Internacia Lingvo povos alporti al G1-lingvaj infanoj lernontaj lingvon C1, egalas por ĉiaj lingvaj kapabloj? Aŭ ĉu, ekzemple, por hispanoj, kiuj volas lerni la germanan, Esperanto helpos pli multe pri vortfarado ol pri verbaj konjugacioj? Do, por kontroli la verecon pri la lernfaciliga valoro de la I.L., krom pri la gepatra lingvo (G) kaj pri la celata lingvo (C), indas precizigi ankaŭ la konsideratajn lingvajn kapablojn (K). Alivorte, oni povas pravigi (aŭ malpravigi, aŭ mezuri) tri-variablajn asertojn, laŭ la modelo:
T(G,C,K): *la lerno de la Internacia Lingvo fare de G-lingvaj lernuloj plifaciligas por ili la postan lernadon de lingvo C, koncerne la kapablaron K.*

Kaj do? Nu, se iu esplor-instituto volus ĝenerale pruvi la lernfaciligon de la I.L., ĝi devus okazigi grandan amason da instru-eksperimentoj. Tamen, pli realisme, en iu medio oni povas fiksi la valorojn de la tri menciitaj variabloj:
G = gepatra lingvo, C = celata lingvo, K = lingvo-kapablaro.
Tiel specialiginte kaj konkretiginte la studendan tezon, ĝi povas plani kaj realigi eksperimenton, per kiu kontroli la verecon de la aserto T(G,C,K), kaj mezuri la grandon de ĝia verŝajneco en tiu speciala kazo.

En la *Tria Universitato de Romo* (Laborejo pri Eksperimenta Instruiko) per modestaj rimedoj ni planas aranĝi unu el la supre difinitaj eksperimentoj, kie la variabloj jene fiksitas:
G = C = itala lingvo, K = prilingva konsciiĝo (konsciiĝo pri la tecriaj lingvaj modeloj) Alivorte nia eksperimenta tezo estas: La lerno de la Internacia Lingvo plibonigas ĉe italaj gelernejanoj la teorian priskrib-kapablon koncerne sian gepatran lingvon. Memkompreneble oni devas klarigi analize kaj konkrete (operacie) tiun kapablaron K, kaj samtempe pretigi la taŭgajn kontrolilojn.
En la nuna stadio de la projekto ni kolektas aliĝojn de italaj instruistoj, por trejni ilin kaj difini la kunligitan klasaran specimenon.
Ĉu ne indus aranĝi similajn paralelajn projektojn en diversaj landoj, eventuale en la kadro de supernacia instanco?

Por ekscii plie:

- La Torre M., *La dua potenco de ESP*, en revuo *Esperanto*, majo 1995
- Corsetti R. - La Torre M., *„Quale lingua prima? - Per un esperimento CEE che utilizzi l'Esperanto*, en la revuo Language Problems and Language Planning, 19/1, Amsterdam, Benjamins, 1995

- Symoens E., *Al nova lingvopolitiko: La propedeŭtika valoro de Esperanto*, Roterdamo, UEA, 1992
- La Torre M., *„Personigitaj malĉeaj Instru-sistemoj"*, en IPR 3/93
- Frank H.,*Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva*,Tübingen,G.Narr,1984

Pidenoto 1:
La itala nomo de la eksperimento estas ESP^2 (ESP je la dua potenco) venas de Eksperimento (itallingve: ESPerimento) pri Esperanto.

Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione Terza Universitá di Roma, via del Castro Pretorio, 20, IT-00185 ROMA, telefono: 0039-6-4957805 retpoŝto: m.latorre@educ.uniroma3.it, telekopiilo: 0039-6-4452642

EKPAROLI

Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al la Rapidigo de Orientlingvo-Lernado kaj Instruado

Esperanto en unuagradaj lernejoj de Viktoria, Aŭstralio

En Aŭstralio, ĉe Monash Universitato estis lanĉita la projekto EKPAROLI, kies celo estas esplori ĉu la lernado de Esperanto en la unuagrada lernejo helpos poste la lernadon de aziaj lingvoj (japana, ĉina, vjetnama) en la duagrada lernejo. Danke al la grandanima financa subteno de AEA kaj de Esperanto-Federacioj en Aŭstralio, la projekto komenciĝis je la fino de oktobro 1994.

Je la komenco estis kontaktitaj 98 unuagradaj lernejoj por ekscii ĉu la lernejoj jam havas LOTE (*Language Other Than English* - „lingvo krom la angla") programon. Se ne, oni informis ilin pri Esperanto kaj sendis la materialon pri EKPAROLI, proponanta *Mazi en Gondolando* kiel lernokurson. Antaŭ la fino de la lernojaro, tri lernejoj konsentis partopreni la esplorprojektojn en 1995. Kvankam Alan Bishop, la patro de la programo, sukcesis interesigi la kolegaron kaj gepatrojn pri Esperanto, grandan problemon kaŭzis, ke mankis instruistoj parolantaj la internacian lingvon. Sekve por naŭ kolegoj de la tri lernejoj estis organizitaj plursemajnaj enkondukaj kaj preparaj lingvokursoj. En la nova studjaro (post februaro 1995) Esperanto jam estas instruata en la 3 lernejoj dum 2,5 horoj semajne. Krom la oficialaj lingvolecionoj la instruistoj klopodas uzi la lingvon ankaŭ dum aliaj lernookupoj de la lernantoj (muziko, sporto, matematiko, geografio, historio, ktp.). La lingvomaterialo dum la komenca fazo baziĝis sur la esperantigita *Mazi*-kurso. Ĝis kiam ekzistis nur ties provbendo de IEI, kun la permeso de BBC oni verkis kompletigan kursmaterialon, laborkajeron kun multaj bildoj kaj taskoj, kiu havis grandan sukceson inter la instruantoj kaj lernantoj. Ĉiuj tri lernejoj jam mendis kaj kun intereso atendas la dumkongresan aperigon de la kompleto *Mazi en Gondolando*.

La enkonduko de Esperanto en la lernejoj jam vekis la atenton de la ĵurnaloj kaj de la loka komunumo. Lingvisto de Universitato de Melburno kritikis la projekton argumentante, ke Esperanto ne havas kulturan fonon. La lernejestro de *Clayton North PS* (unu el la tri eksperimentlernejo) bone kaj efike defendis sian elekton. Alan Bishop atentigis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Titoloj en loka ĵurnalo estis: *„Language of Peace gains a new lease of life"* (Lingvo de paco gajnas novan vivinstigon); *„Sad to see negativity: professor"* (Domaĝe vidi negativecon, profesoro).

Dum tiu ĉi periodo okazis Clayton Festo kie la Federacio de Esperanto jam antaŭlonge decidis deĵori, starigi budon kaj kun helpo de infanoj - novaj lernantoj de Esperanto - propagandi la internacian lingvon. Tio estis sukcesa.

Nun komenciĝas la dua parto de la esplorprojekto, kiun Monash Universitato nun finance kontribuas. Estas dungitaj tri helpantoj por la laboro, kiu konsistos el preparlaboro por sukcese daŭrigi la esploron en la duagradaj lernejoj, trovi novajn unuagradajn por pluaj esploroj. Oni intencas akiri informojn kaj spertojn de la kolegoj laborantaj kadre de diversaj LOTE-programoj.

La rezulto nuntempe estas nekalkulebla kaj eĉ se ĝi montros, ke Esperanto ne helpas pri la lernado de azia lingvo, aŭ ke ĝi helpas same kiel alia LOTE, miloj da homoj en Aŭstralio lernos pri Esperanto kaj ĝiaj uzeblecoj en la internacia komunikado.

*(Koncizigita informo laŭ la raporto, ricevita de **Jennifer R. Bishop**, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio)*

Bernard Golden

KOMPLIKA TRANSITIVECO EN ESPERANTO

KAJ SIMPLIGITA TRANSITIVECO EN IDO

III-a (lasta) parto: Proponita solvo

4.0 Solvo de la problemo: revizlado de la koncepto de transitiveco

En la fruaj jaroj de la historio de Esperanto, d-ro Zamenhof antaŭvidis, ke eble pro gravaj kialoj estos necese entrepreni grandskalan revizion de Esperanto. Plurloke en siaj verkoj li priskribis, kio povos okazi, se venos tempo, kiam Esperanto havos eblon esti oficialigita. Li opiniis, ke nur tiam estos permeseble fari unu fojon por ĉiam reviziadon de la lingvo. En la *Unua Libro* li skribis, ke aŭtoritata akademio povas esti devigata ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonebleco. Ankoraŭfoje en la *Dua Libro* li menciis, ke se kompetenta instruita akademio volas entrepreni reformadon de Esperanto, li tuj sendos al ĝi la tutan materialon kaj fordonos al ĝi la tutan aferon. Trian fojon, en la *Aldono* al la *Dua Libro*, la aŭtoro de Esperanto ripetis sian vidpunkton pri revizio,

klarigante, ke la privilegio ŝanĝi Esperanton apartenas al internacia kongreso de instruituloj.

Konforme al la sinteno de d-ro Zamenhof, oni povas jam nun fari provizorajn planojn por simpligi tiujn aspektojn de Esperanto, kiuj dum la tuta historio de la lingvo okazigis malfacilaĵojn kaj kiuj, sen ombro da dubo, konsistigos stumbligilojn por generacioj en la estonteco.

Lastatempe la komplikaĵoj rilatantaj al la verbaj kategorioj de transitiveco kaj netransitiveco en Esperanto estis ekzamenitaj de *Christer O. Kiselman* (24). La unua alineo de lia studaĵo tekstas jene:

> *„La distingo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto estas bone konata malfacilaĵo. Temas pri gramatika kampo kie Esperanto ŝajnas esti same malregula kiel multaj aliaj naciaj lingvoj"* (pĝ. 1.).

Jam estis menciita la opinio de *Werner Bormann*, ke ĝuste ĉi-speca simileco inter malfacilaj gramatikaĵoj de Esperanto kaj tiuj de etnolingvoj, limigos la eblon de Esperanto konkuri por la rolo de mondolingvo.

Inter la demandoj, kiujn *Kiselman* starigas, estas la sekvaj.

- Ĉu entute indas distingi la netransitivajn disde la transitivaj verboj en Esperanto?
- Se jes, kiel oni devas difini transitivecon?
- Kial Zamenhof ne reguligis la aferon?
- Ĉu entute oni povas vidi iujn regulaĵojn en la verboj rilate al transitiveco?

Krom analizo de la formado de transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto, *Kiselman* havas alian celon:

> *„Dua - kaj evidente multe pli fora - celo estas ioma flegado aŭ normigo de la lingvo: se oni malkovras iun sufiĉe regulan trajton en la formado de verboj, tiam kelkaj aliaj formoj aperas kiel esceptoj, kaj oni povus iom post iom aŭ forgesadi pri ili, aŭ fari iun ŝanĝon. Tiel la lingvo fariĝus iomete pli regula, kaj la lernado iomete pli simpla. Ni fakte vidos ke estas facile fari kelkajn tiajn ŝanĝojn en la klasado de PIV"* (pĝ. 1.).

En la sekvaj sekcioj mi pritraktos kelkajn manierojn atingi la celon forigi malfacilaĵojn rilate la transitivecon de verboj.

Modifado de la lingvo estas farebla en du paŝoj:

1. simpligo laŭ tradicia vojo
2. adopto de regulo eliminanta unutransitivecon de verboj

4.1 Alpreno de novaj radikoj

Antaŭ ol pritrakti proponojn por revizii la klasifon de transitiveco, estas utile ekzameni ankoraŭ ne vaste uzatan rimedon, kiu rilatas ne al la gramatiko de la lingvo sed al ĝia leksiko. Temas pri provo simpligi diferencigon inter transitivaj kaj netransitivaj verboj. Anstataŭ du sufiksoj kiel „-ig" kaj „-iĝ", la lingvo havas du malsamajn radikojn. La sekva tabelo ebligas komparon inter Esperanto, Ido kaj Occidental.

Esperanto		Ido	Occidental
1.	boli (ntr) boligi (tr)		bollir bollientar, cocinar
2.	bruli (ntr) bruligi (tr)		arder, flagrar, combuster brular, incendiar
3.	dati (tr) datiĝi (ntr)	datizar evar (de)	
4.	edzigi (tr) edzinigi (tr) edziĝi (ntr) edziniĝi (ntr)	spozuligar spozinigar spozuleskar spozineskar spozigar (=fari iun edz(in)on) mariajar (=edzoligi, geedzigi fare de funkciulo, pastro ks.) mariajar su (refleksivo=fariĝi edz(in)o)	maritar maritar maritar se maritar se } refleksivo
5.	eĥi (tr) eĥiĝi (ntr)	ekigar resonar	
6.	fini (tr) finiĝi (ntr)		terminar, finir cessar
7.	fumi (tr) fumi (ntr)		fumar emisser fum
8.	naski (tr) naskiĝi (ntr)	parturar, genitar naskar	parturir nascer
9.	pesi (tr) pezi (ntr)	ponderar pezar	ponderar pesar

Rimarkoj

Tiu ĉi rimedo estis aplikita nur sporade en Ido kaj Occidental, ĉar ambaŭ lingvoj adoptis la principon de ambaŭtransitiveco (la „x"-kategorio de PV). Malgraŭ paroj da malsamaj radikoj, restis tubero en la afero. Manke de apartaj markiloj de verba transitiveco, lernantoj devis streĉi la cerbon por memori la transitivecon de ĉiu verbo en la paro. La sola sensufiksa Esperanta vort-duopo en la listo, *„pesi/pezi"*, ilustras tion. Ĉar ĝi estas paronima paro (ambaŭ vortoj havas similan formon sed ilia signifo diferencas), uzantoj de la lingvo estas konstante konfuzitaj (18). La Ido-verboj pluformitaj surbaze de la radiko *spoz-* estas same malfacile memoreblaj kaj uzeblaj kiel la Esperanto serio *„edzigi, edzinigi, edziĝi, edziniĝi"*. Tamen, Ido havas duan radikverbon, *mariajar* (tr), kiu, uzata refleksive, *mariajar su*, esprimas la ekvivalentojn de la netransitivaj Esperantaj verboj. Occidental havas nur unu verbon, *maritar*, kiu ankaŭ estas uzebla refleksive. En studaĵo pri tiu ĉi temo, mi argumentis, ke se la angla lingvo esprimas ĉiujn nuancojn per unu verbo, *marry*, ne estas iu ajn kialo havi kvar formojn en planlingvo (19).

4.2 Nestabileco kaj arbitreco de transitiveco

Laŭ la klasifo de verboj en PV, tri kategorioj estas signitaj per „tr" (transitivaj), „ntr" (netransitivaj) kaj „x" (verboj uzeblaj kaj transitive kaj netransitive). Tridek ses jarojn poste PIV arbitre forigis la „x"-signon, ĉar ĉefredaktoro *G. Waringhien* opiniis, ke „pli bone estas analizi ĉe ĉiu verbo, ĉu unu senco donas transitivan, alia netransitivan karakteron al la radiko" (20). Ĉirilate, pli ol unu kritikanto de la Esperanta leksikografio komentis, ke komparo inter signado de verboj en PV kaj PIV postlasas la impreson, ke la transitiveco de la verboj estis determinitaj per speco de hazardludo. Alia gramatikisto provas klarigi la fenomenon de ŝanĝiĝo de transitiveco per la konstato, ke „la nocio de transitiveco en la naciaj lingvoj, ekzemple en la franca, ne estas absoluta afero. Verboj antaŭe transitivaj estas hodiaŭ netransitivaj kaj kontraŭe". Estas rimerkinde, ke la vortaraj difinoj de „transitiva" kaj „netransitiva" ŝanĝiĝis inter la eldondatoj de PV (1934) kaj PIV (1970) kun la rezulto, ke kelkaj verboj estis metitaj en alian kategorion de transitiveco! (Vd. sekcion 2.3.1) Cetere, eĉ nun pluraj verboj estas signitaj en PIV per „tr" kaj ankaŭ „ntr".

4.3 Evoluo al ambaŭtransitiveco

En sia Esperanta-angla vortaro (21), *M.C. Butler* donas al pluraj verboj tre larĝan uzeblecon rilate transitivecon; efektive, temas pri ambaŭroleco de la verboj. Li klarigas jene: „Ne estas regulo, ke certaj verboj devas aŭ ne devas sekvigi rektan objekton. La plejmulto de „transitivaj" verboj povas esti uzataj elipse sen iu esprimita objekto. La plejmulto da objektoj povas esti anstataŭigitaj per prepozitivo kaj kontraŭe. Kunteksto, klareco kaj la signifo de la radiko estas la plej bonaj gvidoj" (pĝ. 10).

Kelkaj esperantistoj, opiniante, ke la signado de verboj per „x" de PV estas utila, pledas, ke ĝi estu reenkondukita en leksikografiajn verkojn, por ke ĉiuj esperantistoj havu pli da libereco rilate la uzon de verboj.

4.4 Verbaj kategorioj en Ido laŭ la klarigo de Louis de Beaufront

Antaŭ ol montri, kiel la koncepto de verba transitiveco en Esperanto povas esti modifita, ne per drasta ŝanĝo sed per evoluo, estas utile ekzameni la traktadon de la demando en la planlingvo Ido (22). En tiu lingvo ekzistas tri kategorioj de verboj: transitivaj, netransitivaj kaj miksitaj. Malgraŭ la ekzemplo de naciaj lingvoj (kiuj agas pri la transitiveco de verboj malakorde kaj arbitre) verbo estas transitiva en Ido, se ĝi esprimas faron aŭ agon povantan atingi rekte iun objekton: *dankar, mokar, nocar, obediar, repugnar*. Sekve, estas netransitiva en Ido nur la verboj, kiuj logike, nature, kiel *naskar* kaj *mortar* ne povas havi „objekton" (rektan komplementon). Miksitaj oni nomas en Ido iujn verbojn, kiujn la lingvo traktas kiel transitivajn kaj netransitivajn. Neniu ambigueco povas rezulti de tio, ĉar se ili estas uzataj transitive, ili havas „objekton", kaj se ili estas uzataj netransitive, ili ne havas „objekton". Tiu procedo subpremas fonton da malfacilaĵoj kvazaŭ nevenkeblaj; aliflanke, ĝi estas konforma al la kutimo de multaj lingvoj, kaj tiuj ĉi pruvas, ke la dualeco

	Esperanto	Ido	Occidental
1.	boli (ntr) boligi (tr)		bollir bollientar, cocinar
2.	bruli (ntr) bruligi (tr)		arder, flagrar, combuster brular, incendiar
3.	dati (tr) datiĝi (ntr)	datizar evar (de)	
4.	edzigi (tr) edzinigi (tr) edziĝi (ntr) edziniĝi (ntr)	spozuligar spozinigar spozuleskar spozineskar spozigar (=fari iun edz(in)on) mariajar (=edzoligi, geedzigi fare de funkciulo, pastro ks.) mariajar su (refleksivo=fariĝi edz(in)o)	maritar maritar maritar se } refleksivo maritar se }
5.	eĥi (tr) eĥiĝi (ntr)	ekigar resonar	
6.	fini (tr) finiĝi (ntr)		terminar, finir cessar
7.	fumi (tr) fumi (ntr)		fumar emisser fum
8.	naski (tr) naskiĝi (ntr)	parturar, genitar naskar	parturir nascer
9.	pesi (tr) pezi (ntr)	ponderar pezar	ponderar pesar

Rimarkoj

Tiu ĉi rimedo estis aplikita nur sporade en Ido kaj Occidental, ĉar ambaŭ lingvoj adoptis la principon de ambaŭtransitiveco (la „x"-kategorio de PV). Malgraŭ paroj da malsamaj radikoj, restis tubero en la afero. Manke de apartaj markiloj de verba transitiveco, lernantoj devis streĉi la cerbon por memori la transitivecon de ĉiu verbo en la paro. La sola sensufiksa Esperanta vort-duopo en la listo, *„pesi/pezi"*, ilustras tion. Ĉar ĝi estas paronima paro (ambaŭ vortoj havas similan formon sed ilia signifo diferencas), uzantoj de la lingvo estas konstante konfuzitaj (18). La Ido-verboj pluformitaj surbaze de la radiko *spoz-* estas same malfacile memoreblaj kaj uzeblaj kiel la Esperanto serio *„edzigi, edzinigi, edziĝi, edziniĝi"*. Tamen, Ido havas duan radikverbon, *mariajar* (tr), kiu, uzata refleksive, *mariajar su*, esprimas la ekvivalentojn de la netransitivaj Esperantaj verboj. Occidental havas nur unu verbon, *maritar*, kiu ankaŭ estas uzebla refleksive. En studaĵo pri tiu ĉi temo, mi argumentis, ke se la angla lingvo esprimas ĉiujn nuancojn per unu verbo, *marry*, ne estas iu ajn kialo havi kvar formojn en planlingvo (19).

4.2 Nestabileco kaj arbitreco de transitiveco

Laŭ la klasifo de verboj en PV, tri kategorioj estas signitaj per „tr" (transitivaj), „ntr" (netransitivaj) kaj „x" (verboj uzeblaj kaj transitive kaj netransitive). Tridek ses jarojn poste PIV arbitre forigis la „x"-signon, ĉar ĉefredaktoro *G. Waringhien* opiniis, ke „pli bone estas analizi ĉe ĉiu verbo, ĉu unu senco donas transitivan, alia netransitivan karakteron al la radiko" (20). Ĉirilate, pli ol unu kritikanto de la Esperanta leksikografio komentis, ke komparo inter signado de verboj en PV kaj PIV postlasas la impreson, ke la transitiveco de la verboj estis determinitaj per speco de hazardludo. Alia gramatikisto provas klarigi la fenomenon de ŝanĝiĝo de transitiveco per la konstato, ke „la nocio de transitiveco en la naciaj lingvoj, ekzemple en la franca, ne estas absoluta afero. Verboj antaŭe transitivaj estas hodiaŭ netransitivaj kaj kontraŭe". Estas rimerkinde, ke la vortaraj difinoj de „transitiva" kaj „netransitiva" ŝanĝiĝis inter la eldondatoj de PV (1934) kaj PIV (1970) kun la rezulto, ke kelkaj verboj estis metitaj en alian kategorion de transitiveco! (Vd. sekcion 2.3.1) Cetere, eĉ nun pluraj verboj estas signitaj en PIV per „tr" kaj ankaŭ „ntr".

4.3 Evoluo al ambaŭtransitiveco

En sia Esperanta-angla vortaro (21), *M.C. Butler* donas al pluraj verboj tre larĝan uzeblecon rilate transitivecon; efektive, temas pri ambaŭroleco de la verboj. Li klarigas jene: „Ne estas regulo, ke certaj verboj devas aŭ ne devas sekvigi rektan objekton. La plejmulto de „transitivaj" verboj povas esti uzataj elipse sen iu esprimita objekto. La plejmulto da objektoj povas esti anstataŭigitaj per prepozitivo kaj kontraŭe. Kunteksto, klareco kaj la signifo de la radiko estas la plej bonaj gvidoj" (pĝ. 10).

Kelkaj esperantistoj, opiniante, ke la signado de verboj per „x" de PV estas utila, pledas, ke ĝi estu reenkondukita en leksikografiajn verkojn, por ke ĉiuj esperantistoj havu pli da libereco rilate la uzon de verboj.

4.4 Verbaj kategorioj en Ido laŭ la klarigo de Louis de Beaufront

Antaŭ ol montri, kiel la koncepto de verba transitiveco en Esperanto povas esti modifita, ne per drasta ŝanĝo sed per evoluo, estas utile ekzameni la traktadon de la demando en la planlingvo Ido (22). En tiu lingvo ekzistas tri kategorioj de verboj: transitivaj, netransitivaj kaj miksitaj. Malgraŭ la ekzemplo de naciaj lingvoj (kiuj agas pri la transitiveco de verboj malakorde kaj arbitre) verbo estas transitiva en Ido, se ĝi esprimas faron aŭ agon povantan atingi rekte iun objekton: *dankar, mokar, nocar, obediar, repugnar*. Sekve, estas netransitiva en Ido nur la verboj, kiuj logike, nature, kiel *naskar* kaj *mortar* ne povas havi „objekton" (rektan komplementon). Miksitaj oni nomas en Ido iujn verbojn, kiujn la lingvo traktas kiel transitivajn kaj netransitivajn. Neniu ambigueco povas rezulti de tio, ĉar se ili estas uzataj transitive, ili havas „objekton", kaj se ili estas uzataj netransitive, ili ne havas „objekton". Tiu procedo subpremas fonton da malfacilaĵoj kvazaŭ nevenkeblaj; aliflanke, ĝi estas konforma al la kutimo de multaj lingvoj, kaj tiuj ĉi pruvas, ke la dualeco

de senco havas neniun malutilon por la klareco. La sekvaj ekzemploj ilustras tion.

Transitiva uzo	Netransitiva uzo
Il turnis e riturnis sua chapelo.	*La tero turnas sur sua axo.*
Me komencas, duras, cesas, finas mea laboro.	*Mea laboro komencas, duras, cesas, finas.*
Natante la fisho movas sua flosi e kaudo.	*La tero movas (jiras) cirkum la suno.*
On komunikis a me interesanta informi.	*Paris komunikas telefone kun Lyon.*
Me chanjis mea vesti.	*Me chanjis depos mea yuneso,*
Me pendis mea chapelo an arboro.	*Mea chapelo pendis an arboro.*

4.5 Starigo de nova regulo en Esperanto

La sekva paŝo post agnosko de la demotika variaĵo de Esperanto kaj tolero de lingvaj devioj en ĝi, estas starigo de regulo permesanta, ke iu ajn verbo en Esperanto povas esti uzata transitive aŭ netransitive, se la frazo estas senchava. Por klarigi, kial oni ne devas ĉiam uzi la sufiksoidojn „-ig" kaj „-iĝ", oni citas la principon de sufiĉo kiel difinitan en *Oficiala Gazeto* (majo 1913): „se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa." Sekvas el tio, ke jenaj du frazoj estas akcepteblaj: *1. La akvo bolas; 2. Li bolas la akvon.* Citinda estas ankaŭ klarigo pri transitiveco en PAG (sekcio 178, Rim. III, pĝ. 243): „La transitiva uzebleco de verboj estas en Esperanto pli larĝa ol en la naciaj lingvoj ĝenerale: oni povas diri, ke ĉiu verbo povas esti uzata transitive, se la tiel formita esprimo havas sencon. Tio devenas de la 14a regulo, ke ĉiu prepozicio estas anstataŭigebla per la akuzativa kazo. Escepto estas nur la prepozicioj demovaj (de, el)..." PAG malpermesas ankaŭ, ke oni uzu verbon transitive, se per tio oni ŝanĝas ĝian signifon; ekzemple, „bruli" en la frazo „bruli lignon" ne povas havi la sencon de „bruligi". Tamen, en la angla lingvo tia uzo de la verbo *to burn* ne kaŭzas problemon: *wood burns* (ligno brulas); *he burns wood* (li bruligas lignon).

Laŭ la 14a regulo de la *Fundamenta Gramatiko*, se oni ne estas certa pri la specifa prepozicio, kiu devas esti uzata, oni povas uzi „je". Plue, estas eble anstataŭigi „je" per akuzativigo de la substantivo. Laŭ la observo de *Alec Venture*, jam estiĝis kutimo plivastigi tiun permeson, tiel ke en la nuntempa lingvouzo, oni povas anstataŭigi preskaŭ ĉiun prepozicion per la akuzativo (23). Rezulte de tiu evoluo de pensado pri verba transitiveco en Esperanto, ŝajnas, ke ne plu valoras insisti pri rigidaj kategorioj de transitiveco kaj netransitiveco.

Por la estonteco ekzistas jenaj alternativoj. Se oni postulos, ke verboj estu klasifitaj laŭ la tradicia nocio de transitiveco, tiam daŭre regos tensio inter erarhava, subnorma lingvouzo kaj la elita lingvo, strikte konforma al komplikaj gramatikaj reguloj, kiujn relative malmultaj esperantistoj sukcesas perfekte posedi. Male, se oni adoptos liberalan sintenon pri gramatikaj demandoj, tiam estos eble simpligi la traktadon de transitiveco en Esperanto kaj akcepti la demotikan lingvaĵon, kiu jam nuntempe estas la interkomunikilo de granda parto de la Esperanta lingvokomunumo.

Notoj

18. Bernard Golden. *La plej malfacila vortparo en esperanto: „pesi/pezi"*, Bulgara Esperantisto, junio 1981, pĝ. 12-13.
19. Bernard Golden. *Planlingva fuŝaĵo - la verboj „edzigi", „edzinigi", „edziĝi" kaj „edziniĝi"*, Dia Regno, julio-aŭgusto 1983, n-ro 7/8, pĝ. 2512.
20. Vd. noton 12.
21. Montague C. Butler. *Esperanto-English Dictionary*. London: British Esperanto Association, 1967. 450 pĝ. Vd. pĝ. 10.
22. L. de Beaufront. *Kompleta Gramatiko Detaloza di la Linguo Internaciona Ido*, Esch - Alzette: Meier - Heucke; 1925. 232 pĝ. Vd. sekciojn 45 kaj 46; pĝ. 51-53.
23. AVO (pseŭdonimo de Alec Venture). *Laŭokazaj Lingvaj Notoj*, London: Brita Esperanto Asocio; 1977. 95 pĝ. Vd. pĝ. 29.
24. Christer O, Kiselman. *Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto*, Prelego en Prago la 8-an de julio 1994 ĉe la Kolokvo de la Akademio de Esperanto. Reviziita versio: la 8-an de oktobro 1994. 20 pĝ.

EL LA LANDOJ KAJ SEKCIOJ

Aŭstrio

Esperanto en gimnazio ***RAPORTO***

Inter la 24a kaj 27a de februaro 1995 okazis tiel nomita „lerneja projekto" en la realgimnazio *Diefenbachgasse*, 15a distrikto de Vieno. Temas pri tritaga instruado pri la temo „formoj de estetiko". La partoprenantoj vizitas la sepan klason, tio estas la 11a lernojaro. Kadre de la programo la gelernantoj partoprenis ankaŭ instruhoron kun la titolo „Politikaj konceptoj malantaŭ naciaj koloni-lingvoj kaj internaciaj planlingvoj".

La horon gvidis *Walter Klag*, jen la skizo de la instruhoro:

1) Laborlingvoj ĉe internaciaj organizoj (UN, EU);
2) Problemoj de malgrandaj lingvoj, ekzemple tiu de la slovaka;
3) Plano de francoj redukti la nombron de la laborlingvoj en EU de 11 al 5;
4) Kostoj de tradukado sen/kun neŭtrala lingvo;
5) Lingvoj en EU (ĉiu estas minoritata)
   Ortografi-reformo de la germana: unu paŝo al planlingvo.
7) Ĉu Esperanto estas bela? Esperanto kiel oficiala lingvo de PEN-klubo kaj por kristanaj mesoj; originala literaturo kaj tradukoj.
8) Kial Esperanto travivis? *Solresol, Volapük, Esperanto*. Natura evoluo, ekz. aliformiĝo de asociacio al asocio, meteorologio al meteologio. Pri libera vortordo.

Fine s-ro Klag disdonis al ĉiu lernanto la unuan numeron de *La dua jarcento* (aŭstria/slovakia periodaĵo) kaj informilon pri E-kurso en la Viena E-Muzeo.

Brazilo

Kultura Centro de Esperanto en Campinas

De post la 18-a de februaro 1995 la centro havas novan estraron. Nome: *David Bianchini* (1-a prezidanto), *Cláudio Zaina* (2-a prezidanto), *Daniel de Oliveira Santos* (1-a sekretario), *Rosana Bortolette* (2-a sekretario), *Sebastiao Damasena Maio* (1-a kasisto) kaj *Eduardo Ramos Devena* (2-a kasisto).

David Bianchini ekinstruis novan bazan tiel kiel *James R. Piton* ekkunordigas perfektigan E-grupon. Ambaŭ kursoj komenciĝis la 18-an de marto 1995 en la sidejo de *USE-Intermunicipal Campinas (Rua Felipe dos Santos, 105 - Guanabara, Campinas, SP).* *Daniel de O. Santos*

Matematikaj Olimpikoj en 2000

Prof. *Edmilson Pontes*, fama brazila matematikisto, kunordigas matematikajn olimpikojn por gelernantoj de la ŝtato Alagoas, kaj planas okazigi en la jaro 2000 internaciajn olimpikojn kun Esperanto kiel oficiala lingvo. Organizantoj de similaj olimpikoj kaj instruistoj de matematiko kontaktu:

Usina Ciénca/UFAL, Av. Aristen de Andrade (Antiga Faculdade de Odontologia), Maceió-AL, Brazilo. Internet: evp.@ima.ufal.alan.br.

Britio

Esperanto Teacher, organo de la brita asocio de E-instruistoj (ETA), anoncas, ke baldaŭ aperos kompakta stordisko (CD-ROM) kiu interaktive instruas plurajn lingvojn. Esperanto estos inter tiuj, dank' al ETA-membro.

En la sama revuo ***Alan Smalley***, ĉeflekciisto pri la franca ĉe universitato en Leeds, rakontas kiel li donis miniaturan E-kurson al ĉ. 200 studentoj kadre de programo destinita por „konsciigi pri la fenomeno lingvo". Pli frue neniu el la 200 konis E-parolantojn, kaj 40 % eĉ ne aŭdis pri E-o.

Finnlando

INFORMOJ

Inter 22a kaj 28a de julio en la kongresejo funkcios ***MAZI*-stando**. Tie oni povas ricevi la kompleton, dirante la pagnumeron kaj montrante sian kongreskarton. Kompleto konsistas el skatolo kun 2 videokasedoj (90minutaj), instrulibro kaj sonkasedo kun la dialogoj de la filmo.

Tiuj, kiuj ne antaŭmendis ĝin, povos aĉeti la *MAZI*-kompleton ĉe la UEA-libroservo en la kongresejo.

Kiel tradicie oni aranĝos dum la Universala Kongreso ***Cseh*-kurson** kaj *Cseh*-seminarion. Ĉi-foje la programo pliriĉiĝos per la Mazi-filmo. Oni studos, kiel uzi ĝin plej efike kaj *Cseh*-metode dum la instruado: en la kurso instrucele, en la seminario diskutcele. La seminarianoj devos observi la kurson kaj posedi *Bazan Cseh-kurs*-libron. La seminario estas destinita por instruistoj kiuj deziras lerni la metodon kaj eble eĉ atingi ateston pri tio.

Kotizoj: por la kurso 60 NLG kaj por la seminario 80 NLG.

Ambaŭ aranĝojn gvidos *Atiljo Orellana Rojas*.

Hispanio

KURSOJ

Ekde 1990 cirkulas projekto de *Antonio Alonso Núnez*, prezidanto de Hispana E-Federacio, pri internaciaj someraj kursoj en Esperanto. Ŝajnas ke la plano nun finfine havas seriozan ŝancon realiĝi - almenaŭ se E-organizaĵoj rapide donos sian apogon.

Ĉe ni, en Galegio de pluraj jaroj ne plu ekzistas eksplicita kontraŭstaro de kleruloj al Esperanto. La nuna rektora teamo de la Universitato de Santiago de Compostela estas preta subteni, ankaŭ finance, ĉiujaran okazigon de senprofitaj E-Somerkursoj.

La duboj nun reduktiĝis al tio ĉu la E-uzantaro disponas la kapitalon homan kaj kulturan por tia rigore plenkvalita klerigtasko, kaj ĉu ekzistas multnacia studentaro ema ricevi instruadon en Esperanto. Ni pruvu ke jes!

La strukturo de la E-Somerkursoj resumeblas jene. Diverslandaj gelernantoj kolektiĝos por studi dum unu aŭ pluraj semajnoj aron da temoj elekteblaj (matematiko, historio, biologio ktp), laŭ kajeroj verkitaj de e-istaj fakuloj. Ĉi tiuj - aŭ aliaj samnivelaj instruantoj - gvidos kursojn dum po unu semajno. La lernantoj ricevos diplomon, kies oficiala valoro dependos de la juĝo de eksteraj observantoj. La nivelo estos antaŭ-universitata aŭ universitat-prepara, kiu mankas en Esperantujo.

Sendube, nun estas tro malfrue por organizi la E-Somerkursojn dum somero 1995 en la origine planita amplekso. Tamen, eĉ modesta komenco valoras: provizore ni planas eldoni du studkajerojn, kaj venigi 10-20 gelernantojn por lerni dum unu-du semajnoj.

Ĉiu Esperanto-institucio (ŝtata, regiona, faka, loka, kleriga ktp) estas petata bonvole studi la eblecon financi al unu aŭ pluraj el siaj junaj membroj la vojaĝon kaj (malmultekostan) restadon dum 1-2 semajnoj en nia universitato. La preciza dato estas anoncota baldaŭ. Kontaktu: *Antonio Alonso Núnez, Curso de Esperanto, Facultade de Filoloxía, ES-15705 Santiago de Compostela (Hispanio) tel./faks.: +34/81/598-005, retpoŝto: ilganton@uscmail.usc.es*

(*Esperanto* majo 1995)

Hungario

ARANĜOJ

3a Mez-Eŭropa Junulara Semajno kaj ***Internacia Junulara Semajno*** 8.8.1995-15.8.1995 ***en*** **Tata** (Nordokcidenta Hungario). Ĝia temo: **Junularo kaj Ekologio.** Oni intencas okupiĝi pri la diversaj flankoj de la rilato inter junularo kaj ekologio: ekologia edukado; infanoj kiel edukistoj de siaj gepatroj; novaj vivstiloj en la junularo, junulara kulturo, proksimeco al la naturo. **MEJS** estas komuna agado de Aŭstrio, Ĉehio, Germanio, Hungario, Pollando, Slovakio kaj Svislando. Samtempe kaj samloke okazos la **REF** (Renkontiĝo de Esperantaj Familioj). La partoprenkotizo varias inter 30 kaj 290 NLG. Aliĝilojn kaj informojn petu de: *Edit Lindwurm, H-1203 Budapest, Lajtha L. u. 1. IX/56.*

Japanio

Du ekstermovadaj komercaj kursoj en Japanio: unu estas la „malfermita kolegio" (etendado de universitato) de la universitato *Waseda*, al kiu kunlaboras la *Japana Esperanto-Instituto* (JEI) kaj eĉ dividis profiton kun la altlernejo. Ĝi ofertas du nivelojn, instruataj de *WADA Seiiti* kaj *Krizantemo* respektive. La alia estas klaso ĉe la prestiĝa eldonejo en la lingvistika tereno *Daigaku Syorin*, kiu unuafoje post kelkjara malsukceso (pro manko de aliĝontoj) komenciĝis lastan jaron. Ankaŭ ĝi havas du nivelojn, unu el kiuj estas daŭrigo de la enkonduka klaso lastjara. La gvidanto estas *KITAGAWA Hisasi* de la Oficejo de JEI kaj iama volontulo ĉe la CO de UEA.

Iniciate de s-ino SUZUKI Masumi, estrarano de Japana E-Instituto (Fukaya 122-10, Ayase-shi, Kanagawa-ken, 252), fondiĝis kaj akceptas aliĝojn Konferenco pri Esperanto-edukado de Japanio. Kiam ĝi iĝos landa sekcio de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj? - demandas YAMASAKI Seiko en *La Revuo Orienta*.

(*Laŭ la Revuo Orienta* aprilo 1995)

Litovio

Plene funkcias Litova Esperanto-Asocio



La domo de la bopatro de Zamenhof, nun sidejo de LEA (*Litova E-Asocio*) lastatempe estis vizitata de multaj homoj, kiuj lernas Esperanton. De lundo ĝis vendredo ili kolektiĝis en tri klasoj por lerni la lingvon laŭ la *Cseh*-metodo. La 90minutaj lecionoj okazis trifoje tage. La kursojn gvidis brazila *Cseh*-instruisto, rajtigita de IEI (Internacia E-Instituto), s-ro *Aristóphio Andrade Alves Filho*, kiu vojaĝas kun la edzino *Núbia Alves* en Eŭropo. Krom tio LEA organizas la 31-an BET - *Balta E-Tendaro* - de la 8a ĝis la 16a de julio kaj karavanon al la 80a UK en *Tampereo*. Oni organizis ankaŭ sabatan konversacian rondon kaj dufoje semajne kunsidas la lokaj kluboj. La kursojn antaŭpreparis la redaktoro de *Litova Stelo*. Li prelegis pri Esperanto la 1an de februaro por pli ol 120 homoj, kiuj poste plenigis enketilon por partopreni kursojn. La sekvan tagon 70 el ili eklernis la lingvon kaj la ceteraj atendis la martajn klasojn. Por lerni en marto aperis 55 personoj. La 31an de marto 52 kursfinintoj ricevis la atestilojn pri partopreno en 40horaj kursoj. Ĉeestis la feston s-*roj Povilas Jegorovas*, *Petras Ĉeliauskas* kaj s-ino *Irena Alijošiute* (respektive: prezidanto, redaktoro kaj sekretariino de LEA), kiuj entuziasme parolis al la ĵus bakitaj esperantistoj pri la eblecoj, kiujn donas la internacia lingvo. La kursanoj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj kaj akceptas proponojn. Ankaŭ la instruisto deziras korespondi kun aliaj E-instruistoj por interŝanĝi ideojn pri instruado al junuloj kaj plenkreskuloj. Krome li akceptas proponojn por instrui la lingvon laŭ *Cseh*-metodo ie ajn, ĝis aŭgusto 1996. Lia vojaĝado celas ne turismadon, sed li deziras konatiĝi kun la E-movado en diversaj urboj por pli bone agadi post sia reveno al Brazilo. Proponojn sendu al: *Litova E-asocio a/c Aristóphio Alves Filho, a.d. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio*. (Post junio lian adreson havos *Internacia E-Instituto, Den Hago, Nederlando*). En Pollando li instruis la portugalan lingvon al studentoj de *Monda Turismo/Esperantotur (Bydgoszcz)* kaj prelegis pri Brazilo kelkloke.

LEA bonvenigas esperantaĵojn el la tuta mondo (librojn, gazetojn, kasedojn, ludilojn, k.a.). Helpu ĝian agadon! Abonu kaj abonigu *Litova Stelo* (dumonata organo de LEA)! Abonprezo por 6 kajeroj estas 20 NLG (inkl. sendokosto). Kolektoj de la jaroj 1991-1994 riceveblas kontraŭ nur 12 NLG ĉiu kolekto.

Madagaskaro

La dekano de la beletra fakultato de Universitato Antananarivo decidis startigi E-kurson en majo. Konvinkis lin *Désiré Rabevazaha*, ĉe kiu bonvenas subteno kaj helpo: *B.P. 3171, Antananarivo-101*

En komerca kaj teknika altlernejo EPCT Esperanto estas devige instruata ĉiusabate de *Roger Rasolofo*. Skribu kuraĝige al: *EPCT - Esperanto-kurso, Lot. II.N. 54 bis, Analamahitsy, MG-101 Antananrivo*

(*Esperanto*, majo 1995)

Pollando

KURSOJ

Internacia Asocio „Monda Turismo" kun sidejo en Bydgoszcz, invitas al *Internacia studumo pri Turismo kaj Kulturo*, kiu funkcias ekde 1991, kaj en 1994 transformiĝis - el naŭmonata - en trijaran ĉiutagan kaj malĉeestan lernejon.

La studumo ebligas en laŭvicaj jaroj akiri jenajn kvalifikojn:

1-a jaro: turisma informanto, lektoro de E-o kaj E-vojaĝgvidanto; la finintoj ricevas diplomon de organizanto de la internaciaj turismo kaj kulturo.

2-a jaro: turisma E-ĉiĉerono, animanto de kulturo kaj kursgvidanto de E-o; la finintoj ricevas atestilon de memstara laboranto de la internaciaj turismo kaj kulturo.

3-a jaro: gvidanto de turismo kaj kulturo kaj instruisto de Esperanto; la finintoj fariĝos specialistoj pri la internaciaj turismo kaj kulturo.

La lernado daŭras dum unu, du aŭ tri jaroj - laŭ ĉiutaga malĉeesta sistemo.

Krom E-o oni okupiĝos ankaŭ pri aliaj lingvoj kaj pri kulturoj de diversaj landoj. Fininte la tutan trijaran eduk-ciklon kaj plenuminte la postulojn de la *Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino*, laŭ ties statuto, oni povos akiri ankaŭ la prestiĝ-donan titolon de bakalaŭro de AIS. Tiuj, kiuj ne povas aliĝi por la ĉiutaga stud-sistemo, povas elekti la eksterĉeestan formon. Ili rajtos partopreni ĉiujn kursojn, seminariojn kaj prelegojn, kaj devos ĉeesti specialajn sesiojn instru-ekzamenajn, kiuj en la studjaro 1995/96 okazos:

Aŭtuna semestro: 1-a sesio - 24 septembro - 1 oktobro 1995,
2-a sesio - 27 januaro - 3 februaro 1996,
Printempa semestro: 1-a sesio - 4 -11 februaro 1996,
2-a sesio - 27 aprilo - 5 majo 1996.

La studkostoj en la jaro 1995/96 estas samaj por la ĉiutaga kaj malĉeesta sistemoj kaj egalas al 200 usonaj dolaroj. Aliĝoj: ĝis la 31-a de julio 1995 ĉe „Monda Turismo"; samtempe oni pagu la studkostojn al la bankkonto: „Esperantotur", *Wielkopolski Bank Kredytowy O/Bydgoszcz n-ro 350815-2583-136-72*. Pli detalajn informojn oni povas akiri ĉe la Centra Oficejo de „Monda Turismo" kaj Turisma Servo „Esperantotur": *Str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, tel. +48.52.415744 - Fakso +48.52.460082 - Telekso 562844 MTUR PL Adam Sudol - Andrzej Grzebowski*

Svisio

KCE

La nova Direkta Komitato de KCE (Kultura Centro Esperantista) konsistas el ges-roj *David Buhlmann, Georges Lagrange, Marco Picasso, Giorgio Silfer* kaj *Jaqueline Vasserot*. La eksterordinara Asembleo elektis d-ron Silfer prezidanto de KCE. La Asembleo decidis ke KCE kaj GEP [Gastejo Edmond Privat, prezidanto *Mireille Grosjean*] estas ekde januaro 1995 absolute sendependaj ne nur jure kaj organize, sed ankaŭ administre kaj finance.

La aliĝo al Kultura Monatfino kostas 60,- CHF kaj tiu sumo inkluzivas programon kaj vespermanĝon. La aliĝo al somera kurso kostas 120,- CHF, kaj ĝi inkluzivas nur la instruadon. Eblas tranokti ĉe *La Domparo* (po 15,-/30,-/40,- laŭ nombro da litoj en la ĉambro), sed nur por 15 personoj. Krome en la urbo ne mankas junulgastejo kaj modestprezaj hoteloj. Eblas matenmanĝi ĉiutage ĉe *La Domparo*, eĉ se oni ne tranoktas: abunda matenmanĝo kostas 8,- CHF.

Kultura Centro Esperantista, Strato Postiers 27, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando, Telefono/fakso (41)39-267407, Poŝta ĉekkonto 23-2921-8

Usono

Somera Esperanto Universitato en San Francisko jam la 26an fojon

[NdlR. En la antaŭa numero vi jam povis legi pri tiu ĉi evento. Pro la graveco de la afero, nun sekvu pri ĝi pliaj informoj].

La kursojn subtenas la *Nord-Amerika Esperanto Ligo*. Ĝi okazas inter la 26a de junio kaj 14a de julio 1995 en kvar grupoj:

komencanta: *Saluton al Esperanto* - por tiuj, kiuj ankoraŭ ne lernis E-on,
mezgrada I.: *Ricevi memfidon en Esperanto* - por tiuj, kiuj jam lernis E-on,
mezgrada II.: *Lerni kaj instrui Esperanton* - por instruant/ont/oj de E-o,
supergrada: *Lingvo, lingvistiko, kulturo, literaturo* - ĝiaj temoj: lingvouzo, aplikata lingvistiko, kulturo kaj literaturo.

La instruistoj:

Duncan Charters (Usono), estro de la *Fremdlingva Departemento de Principia College,*

Spomenka Štimec (Kroatio), kunlaboranto de pluraj E-organizaĵoj, aŭtoro de multaj E-libroj,

Atilio Orellana Rojas (Argentino), kiu studis kaj instruis multajn lingvojn, gvidas Esperanto seminariojn laŭ la *Cseh-metodo* en multaj landoj, kaj

Setsuko Umeda, kiu studis Esperanton en San Francisko, la anglan en Usono kaj Japanio, partoprenis multajn UK-ojn kaj instruis en multaj E-kursoj. (Nun ŝi estras la Internacian Kulturan Laborejon).

La tempodaŭro de ĉiu intensiva kurso estos 3 semajnoj. Ili donas tri universitatajn unuojn. La partoprenkotizo de ĉiu kurso estas 345 USD.

La *SFSU Studenta Stipendio Fondaĵo* parte financas la aliĝon de tiuj, kiuj tion bezonas kaj ĝi samtempe petas helpon de la kluboj kaj individuoj.

Krom la studado okazos vesperaj Esperanto-programoj, ekzemple komuna kantado, popoldancado, prelegoj pri la lingvo kaj kulturo, formado de konversaciaj rondoj. *(El la angla lingvo tradukis: d-ro Petro Murányi - Hungario)*

Uzbekio

ALVOKO

Samarkandaj **E-aktivuloj preparis la unuan lernolibron por uzbek-lingvanoj** kaj krome uzbekan-Esperantan-rusan konversacilibron. Eldoni tiujn bazajn verkojn inter la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj apenaŭ eblos sen helpo de la internacia esperantistaro. Kontribuojn oni sendu al UEA-konto: mpso-i. Nomoj de ĉiuj kontribuintoj aperos en ambaŭ libroj. Koran antaŭdankon!

Helpemuloj estas petataj anonci sin ĉe:
Muzeo de Paco kaj Solidaro, pk 76, UZ-70300 Samarkand, Uzbekio

Venezuelo

RAPORTO

Meze de februaro fermiĝis la baza kurso de Esperanto gvidita de profesoro *Juan Negrete* en la Lernejo de Filozofio de la Centra Universitato de Venezuelo, en Karakas. Nova baza kurso ekfunkciis komence de marto. En la sama loko, kaj same komence de marto startis daŭriga kurso. Pri la kursoj zorgas profesoroj *Juan Negrete* kaj *Jorge C. Mosonyi*.

Estas tre aktivaj la kontaktoj kaj rilatoj de nia Asocio kun la Lernejo de Modernaj Lingvoj de la Centra Universitato, cele al la starigo de kursoj de Esperanto kiel elektebla studobjekto ekde la venonta lernojaro. Intertempe oni preparas la terenon per prelegoj kaj ekspozicioj de libroj kaj revuoj. Nia prezidanto, profesoro *Jorge Mosonyi* kunordigas la preparlaboron kaj gvidos la kursojn, kiujn partoprenos pro programaj postuloj la gestudentoj de la 4-a kaj 5-a jaroj. La Lernejo kreas lingvo-instruistojn, interpretistojn kaj tradukistojn.

Duajare funkcias baza kurso de Esperanto ĉe la *Instituto de Homeopatio* kun unuhora leciono ĉiuĵaŭde kaj kun elektebla karaktero. Tamen la kurshoroj estas agnoskitaj kadre de la devigaj studhoroj antaŭviditaj de la lerneja programo. La kurson gvidas d-ro *José Barros Saint-Pasteur* kaj s-ro *Andrés Turrisi*.

(*Venezula Stelo* marto 1995)

Tago de la Lernejo (enkonduke) *UK kaj ILEI*

Esperanto kiel enkondukilo en la lernadon de fremdaj lingvoj?

Ni konsideru la eblan konsterniĝon de lernantoj pro la ege grandaj distancoj inter la promesoj pri la helpfunkcio kaj la realaj baroj survoje al ekregado de „natura" fremda lingvo. Ĉu la vaste aprezata propedeŭtika valoro de Esperanto manifestiĝas en personec-evoluigaj instigoj, ekzemple rilate al la pli profunda kompreno de la aliaj popoloj aŭ koncerne pli ĝustan prijuĝon de niaj propraj sentoj kaj animstatoj? Dum la *Tago de la Lernejo* kongresanoj havos la eblecon ekkoni la rezultojn de la nun funkciantaj propedeŭtikaj projektoj, kiel *Fundapax, Ekparoli*, kaj ankaŭ aliajn interesaĵojn ligitajn al la temo ekz. la projekton *Infanoj ĉirkaŭ la mondo*. Certe ne mankos prezento de la nun aperanta video-kurso *Mazi en Gondolando*, kiun multaj kongresanoj ekhavos jam dum la UK. Al la programo aldoniĝos prezento de la *Instruista terminaro* de *Mauro la Torre*. Se vin interesas detaloj pri la temo, nepre vizitu la ILEI-konferencon tuj post la UK.

Ekzamena raporto '94 *UEA/ILEI*

En 1994 ekfunkciis nova sekretario pri elementa kaj meza niveloj, prof. *Ivan Bekavac-Basiĉ* en Zagrebo. La ekzamenoj de UEA kaj ILEI sesiis rekordkvante en la pasinta jaro: 12 fojojn, en 9 landoj de 4 kontinentoj. Aparte elstaris la 16 sukcesintoj - plejparte aziaj - dum la ILEI-konferenco en Kangnam, kaj la 8 junaj albanoj, ricevintaj elementan diplomon en Zagrebo. Entute 87 homoj kandidatis (48 por la elementa kaj 39 por la meza ekzamenoj) kaj 74 sukcesis (po 37 je elementa kaj meza niveloj). Per tio la nombro de ĉiuj sukcesintoj de la UEA/ILEI-ekzamenoj ekde la komenco en 1989 altiĝis al 409.

Pasintjare ofte montriĝis ke la movadaj kaj literaturaj konoj de la kandidatoj ne atingas la nivelon de iliaj lingvokonoj. Pri tio oni povas iom helpi per aparta prepar-seminario, kaj antaŭ tri sesioj efektive okazis tia. Alia problemo, ke daŭre mankis novaj testoj. Malgraŭ promesoj, neniu verkis por ILEI novan materialon. Pro tio, kombinoj de malnovaj testoj estis uzataj. Ni do direktas inviton al ĉiuj kapabluloj verki, precipe antaŭtestojn. Tiujn du gravajn elementojn ni esperas plenumi dum la sekva jaro.

Urbo, lando, monato de la sesio	*Kandidatoj*		*Sukcesis*	
	elementa	*meza*	*elementa*	*meza*
1. Zagrebo, Kroatio: majo	9	-	8	-
2. Jyväskylä, Finnlando: julio	7	6	7	6
3. San Francisko, Usono: julio	2	3	1	3
4. KCE, Svislando: julio	1	6	1	6
5. UK, Seulo, Koreio: julio	6	5	5	5
6. Ch'onan, Koreio: aŭgusto	1	1	1	1
7. Kangnam, Koreio: aŭgusto	4	14	4	12
8. Barlaston, Britio: aŭgusto	1	3	1	3
9. Sete, Francio: septembro	2	1	1	1
10. Togolando: septembro	7	-	3	-
11. Zagrebo, Kroatio: decembro	2	-	2	-
12. Wimeba, Ganao: decembro	6	-	3	-
	48	39	37	37
Sume	87		74	

Kompilis Marija Belošević kaj Ivan Bekavac-Basiĉ

Ekzamena kalendaro 1995

18-22.07 61-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Onnela, Finnlando
22-29.07 Universala Kongreso de Esperanto, Tampereo, Finnlando
29.07-04.08 Konferenco de ILEI, Övik, Finnlando
15-17.08 Esperanto somerlernejo, Barlaston, Britio
02-09.09 21-a Internacia semajno de Esperanto, Sete, Francio
komence de sept. Tutlanda E-Kongreso, Yangzhou, Ĉinio.

Ni petas ĉiujn kandidatojn nepre kontakti la sekretarion de la Internacia Esperanto-Komisiono, ĉe kiu oni povos ricevi detalajn informojn pri la ekzamenoj: *prof. Ivan Bekavac-Basiĉ, Kuslanova 59, HR-41000 Zagreb, Kroatio.*

Alvoko

Ni estas tre feliĉaj, ĉar pluraj partoprenantoj de la pasintjara ILEI konferenco el aziaj landoj post la reveno hejmen tre serioze ekokupiĝis pri E-o. Bedaŭrinde, ili renkontas grandajn problemojn, ekz. manko de la lernolibroj, taŭga legmaterialo ktm. Ĉiuj, kiuj pretas helpi, kontaktu la sekretarion de ILEI, ĉe kiu oni ricevos ĉiujn necesajn informojn. Same, ni atentigas vin, ke pluraj aliaj mondregionoj bezonas vian konkretan helpon en formo de instru- kaj legmaterialoj. Se vi pretas donaci novajn aŭ jam uzitajn materialojn, nepre kontaktu la sekretarion de ILEI. Same, skribu ankaŭ tiuj, kiuj bezonas la helpon. Dankon!

UEA estrarkunsido *RAPORTO*

La printempa UEA estrarkunsido okazis marte en la CO. Kiel kutime, ĝin partoprenis kiel observanto ankaŭ la reprezentanto de ILEI.

Krom pluraj aktualaĵoj la estraro dediĉis tempon ankaŭ al la instruado. La ILEI-reprezentanto prezentis koncizan raporton de ILEI por la jaro 1994 kun aparta pritrakto de la ekzamenoj, kiuj ja estas komuna agado de la du organizoj. Por doni pli da prestiĝo al la ekzamenoj, la estraro proponas al siaj delegitoj atingi almenaŭ la nivelon de la meza ekzameno. UEA helpos eldoni la elĉerpitan gvidlibron por la ekzamenoj. La estraro esprimis la esperon, ke dum la venonta jaro ekfunkcios la supera nivelo. Estis prezentitaj ankaŭ koncizaj raportoj de diversaj instru-projektoj, kiuj ekis dum la lasta jaro. *M.B*

Konkursoj kiujn aprobis la praktiko

(Daŭrigo)

En la antaŭa numero mi skribis pri du konkursoj de *ILEI-komisiono pri lernejaj konkursoj*. Nun, daŭrigante la temon mi deziras raporti pri du aliaj kun espero veki la atenton de kelkaj kolegoj.

❸ Unu el ili estas la *Internacia Konkurso pri Modela Esperanta Parolo honore al Ivo Lapenna.* Malgraŭ ke la fonetikaj principoj de nia lingvo ne estas strikte ellaboritaj, aŭ ĝuste tial, ni trovas necesa la ekziston de tia konkurso por turni la atenton al kelke neglektita tereno, kiu niaopinie meritas atenton pli grandan.

Ĝis nun okazis nur tri konkursoj. La unua celis mezlernejanojn (15-18 jarajn), la dua, pasintjara, volis altiri 10-14 jarulojn, kaj la lasta, kies rezulto jus evidentiĝis, denove mobilizis mezlernejanojn. Bedaŭrinde la nombro de la konkursantoj ĉiufoje estis malgranda. Krom hungaroj partoprenis en ili francoj, angloj kaj kroatoj. Mi multe bedaŭras pro tio, ĉar jen ekzistas konkurso, kiu apenaŭ bezonas preparon kaj elspezon.

Kial?

Ĉar la konkursantoj ne bezonas veturi malproksimen, kie ĵurio priĵuĝas ilian prononcon; ne, ili restas hejme aŭ veturas al iu proksima urbo, kie troviĝas bona, sonizolita studio, en kiu iu registras, unue, la libere elektitan prozan tekston, kiu ne superas 20 tajpitajn liniojn, poste ili voĉlegas la devigan tekston komunan por ĉiu konkursanto. La devigan tekston ili ricevas nur 10 minutojn antaŭ la surbendigo. La registraĵoj venintaj el diversaj landoj kaj urboj estas kunmuntataj kaj kopiataj en pluraj ekzempleroj. La sonregistraĵoj veturas poste al la ĵurianoj, kiuj ĝis nun ĉiam apartenis al diversaj lingvofamilioj. Ĉijare la voĉoj estis ĵuriitaj de *s-ino Kremona Bâceva* (Sofio, bulgarino), *d-ino Ilona Koutny* (Budapeŝto, hungarino) kaj *s-ro Germain Pirlot* (Belgio, franclingvano). Konsiderante diversajn bazajn fonetikajn kriteriojn ili plenigas t.n. poentofolion. Poste la poentoj de la ĵurianoj venas al la centro, kie adiciinte la akiritajn poentoj formiĝas la sinsekvo de la konkursantoj. Ĉiuj partoprenintoj ricevas memorkarton, la unuaj diplomon kaj librodonacon. Estus tre ĝojinde, se niaj instruistoj grandnombre aligus siajn lernantojn al la konkurso, kiu sendube riĉigus ilin per agrabla travivaĵo se ne paroli pri la praktika utilo.

❹ Populara kaj tre instrua - por pedagogoj kaj lernantoj egale - estas la *Tutlanda (=Hungaria) Esperanta Deklamkonkurso honore al Julio Baghy.* Ĝi okazas ĉiujare en aprilo, kiam la hungaroj, honore al elstara poeto *Attila József* (1905-1937) havas sian Tagon de Poezio. Ĉi-jare la 8-an de aprilo kolektiĝis ĉ. 60 personoj (gastrolis jam ne la unuan fojon ankaŭ Zagrebaj geamikoj) kaj solene komenciĝis la 6-a revuo de poeziamantoj en Esperanto. La konkurso estis malfermita de la vicurbestro de Pápa, Transdanubia urbo, kiu ĉiufoje varmkore invitas kaj akceptas siajn gastojn. La iniciatoro kaj ĉeforganizanto de la konkurso estas *s-ro Jozefo Németh,* la redaktoro de IPR. La konkursantoj prezentas poemon aŭ prozaĵon libere elektitan. Ili elektas klasikajn poeziaĵojn de *L.L.Zamenhof* kaj *A.Grabowski*, elstarajn originalajn poemojn de *M.Boulton, K.Kalocsay, J.Baghy. R.Schwartz* k.a. Multaj volonte elektas konatajn hungarajn artverkojn tradukitajn de eminentaj esperantistoj. De jaro al jaro kreskas la nivelo de la konkurso, kiun lastatempe kompletigas kulturaj programoj: muziko, dancoj, ekspozicio, ĉi-foje tiu de *ges-roj Rössler* el Germanio.

Pri la konkurso raportis pluraj lokaj ĵurnaloj, la E-redakcio de la Hungara Radio Kossuth, ĉefaj periodaĵoj E-lingvaj *Eventoj, Esperanto, Heroldo.*

La konkurso mem okazas en kvar kategorioj. En la unua prezentas sin la plej junaj lernantoj (ne pli ol 10 jaraj). La duan formas geknaboj en la aĝo de 11-14 jaroj. La tria kategorio entenas gejunulojn 15-18 jarajn kaj, fine, al la kvara kategorio apartenas ĉiuj personoj kun pli ol 18 jaroj.

La ĵurio konsistas el konataj hungaraj esperantistoj kaj eksterlandaj invititoj.


Fine, kion diri resume? Per niaj konkursoj porokazaj kaj konstanta ni mobilizas ĉirkaŭ 350 personojn. Ne tre multajn, tamen konsiderante ke la praktika valoro de Esperanto ankoraŭ ne estas komparebla kun la furoraj mondaj lingvoj, oni devas alte taksi tiun modestan (?) nombron, tiom pli ke similaj aktivadoj en Esperanto ne svarmas. Nia nova generacio, la ĵusaj varbitoj estas do tre malsataj je sukcesoj akiritaj per la „nova" lingvo. Tio estas nur unu flanko de la medalo. La alia, ne malpli grava estas la formiĝo de fruktodona laborkontakto inter pedagogoj, kiuj volonte kunlaboras, redaktas taskofoliojn, korektas solvojn, tradukaĵojn, ĵurias poemojn ktp. Vera amikeco, bona interkolega etoso ekestas - mi estas profunde konvinkita pri tio - dum komuna agado. Niaj tiuterenaj

rezultoj estas, ni povas diri sen troigo, enviindaj.

Ĉu mi sukcesis fari al vi „apetiton" pri iu el la prezentitaj konkursoj? Esperante ke du-tri kolegoj decidos pozitive mi skribas la limdatojn memorige: al konkurso pri *arta traduko* (nur por hungaroj) vi povas aliĝi ĝis la *25-a de septembro*; al la internacia *poentokolekta* konstanta *konkurso* (7 n-roj en ĉiu lernojaro) estas necese skribi antaŭ la *30-a de septembro.* Kiuj deziras konkursigi siajn lernantojn (ĉi-foje 10-14 jarajn) pri *modela Esperanta parolo*, tiuj skribu ĝis la *20-a de januaro* kaj, fine, la limdato por tiuj kiuj volas partopreni en *deklamkonkurso* aliĝu antaŭ la *15-a de marto.* La centro de la konkursoj: *Gimnazio Julia Bányai/ Esperanto-grupo/ Nyíri út 11./ H-6000 Kecskemét/ Hungario.* Ĝi povas sendi al vi ankaŭ regularojn, alvokojn, reklamfoliojn kaj specimene taskofoliojn pasintjarajn.

Kun amikaj bondeziroj salutas vin el Hungario

Géza Kuruc
komisionestro de ILEI



Tigre aŭ pigre al lingvo-lernado?

Francio transprenas nun* la ses-monatan prezidantecon de la Eŭropa Unio (EU). Ĝi volas kapti la okazon fortigi la lingvan diversecon de la EU, por — laŭ cinikuloj — defendi la pozicion de la franca. Nemire. La angla antaŭenpaŝadis nehaltigeble al la rolo de komuna eŭropa lingvo. Laŭ ciferoj de la Eŭropa Komisiono, 83 % de mezlernejaj studentoj en EU-landoj lernas la anglan kiel fremdan lingvon, dume nur 32 % lernas la francan kaj 16 % la germanan. Nur en Flandrio (la nederlandlingva parto de Belgio) la angla ne okupas la unuan lokon, pro la neceso instrui la francan por permesi komunikadon kun la belgaj franclingvanoj, la valonoj.

La eŭropa situacio, bildigita apude, helpas klarigi la obstinan unulingvecon de britoj. Se tiom da junuloj lernas la anglan kontinente, kial sin ĝeni lerni duan lingvon? Eĉ en la lingve sentiva Francio, 84 % el la mez-lernejanoj (angle *secondary school*, t.e. proks. 13-16-jaruloj) lernas la anglan. Kontraste, kvankam la franca estas la plej kutima fremda lingvo en britaj mezlernejoj, nur 59 % lernas ĝin.

Dum la nederlandanoj statistike lernas po 2,2 lingvojn/po lernanto, la responda cifero por Britio estas 0,9 — en la EU nur Portugalio atingas malpli (0,8). Scivolindas la cifero por Svislando, sed tion la EU ne statistikas!

Ĉu la epoko de selektiva lingva pigreco venos al la fino? Franca propono postulus, ke ĉiu mezlernejano en EU lernu minimume du fremdajn lingvojn — ne nur la lingvon de Ŝekspiro kaj MTV, sed krome alian, kiu plej verŝajne temus pri la lingvo de Molière, Proust kaj TV5. Sed ĉio esprimita kompreneble laŭ la celo kreskigi la eŭropan interkompreniĝon.

Pli grandaj timoj leviĝas pri alia kontraŭsenca, sed apenaŭ originala propono de la franca Ministro pri Eŭropaj aferoj, ke la nombro de oficialaj laborlingvoj de EU-organoj malkresku de dek unu ĝis kvin. Tre racia ideo kaj en si mem praktike laŭdinda. Sed provu konvinki la grekojn, la portugalojn (aŭ la finnojn kaj svedojn) pri tio.

Bazita sur anglalingva artikolo — tradukis, modifis, prikomentis smg.

ILEI kunsidis en Hamburgo

RAPORTO

La kunsido de la ILEI-estraro ĉi-jare okazis ne marte, sed maje. Tiu du-monata prokrastiĝo donis la eblecon trarigardi ĉion preparitan por la UK kaj la konferenco, kaj dividi taskojn.

* Temas pri aŭtuno 1994. [NdlR.]

Al la sukcesa kunsido grave kontribuis ne nur la tri ĉeestaj estraranoj: *Bertil Andreasson, Marija Beloševiĉ* kaj *Till Dahlenburg*, sed ankaŭ *Duncan Charters, Stefan MacGill, Zsuzsa Barcsay* kaj *Edward Symoens*.

La estraro pridiskutis raporton pri la jaro 1994 kaj trijaran laborplanon por 1995-97. Ambaŭ dokumentoj estos senditaj al la ILEI-komitato kiu voĉdonos pri ili en Finnlando. Post tio, la trijara laborplano estos publikigita en IPR, sed ankaŭ aparte ricevebla.

Oni tre profunde priparolis la preparojn por la ĉi-someraj okazaĵoj kaj konstatis, ke la kongreson kaj ILEI-konferencon partoprenos nur du estraranoj. Tial oni invitas ĉiujn kiuj pretas helpi dum la UK-ekzamensesio, deĵorado ĉe la budo (tuttaga) kaj poste dum la konferenco. La programo por la Tago de la Lernejo estas preta. (Legu aparte).

Komitatkunsido: ni petas la sekciojn antaŭ la 1-a de julio nomi siajn komitatanojn kaj informi la sekretarion pri iliaj nomoj. Ĉi-jare tri estraranoj retiriĝos, el kiuj almenaŭ du rekandidatiĝos. La elekto- komisiono ja tre serioze agas tiukampe. Preparoj por la konferenco en la jaro 1996 progresas, kaj ni ege esperas jam en Finnlando havi provizoran aliĝilon.

La estraro pridiskutis la rilatojn kun diversaj E-organizaĵoj. En la unua loko troviĝas UEA. La kunlaboro kontente daŭras. ILEI starigis kontaktojn kun aliaj E-organizaĵoj TEJO, LIBE. Ni spronos al plia kunlaboro. En la raporto pri la komisiitoj, la estraro esprimis la kontenton pri la laboro de kelkaj komisiitoj kaj reprezentantoj. Danke al la reprezentanto ĉe UNESKO kontaktoj kun tiu grava organizo plivigliĝis dum la lastaj monatoj. Oni aparte substrekas la modelan agadon de Géza Kurucz, gvidanto de la lernejaj konkursoj. Por plifortigi la financan staton de la Ligo, kiu bedaŭre same pasintjare suferis pro deficito, oni decidis krei plurajn celkasojn kiuj espereble instigos samideanojn donaci monon por iu projekto.

Same estis pridiskutitaj la ekzamenoj. Estis decidite ke ĉi-jare ĉiuj ekzamentestoj estos novaj. Ĝoje la estraro ricevis la informon ke UEA pretas reeldoni la gvidlibron por la ekzamenoj. ILEI reredaktos la malnovan kaj aldonos iom pli da klarigoj pri la postuloj de la ekzamenoj. Estis pridiskutita problemo pri la nesufiĉa kono de la literaturo kaj movado, kaj oni decidis ke minimumon kiu estos priskribota en la libreto devus koni ĉiu kandidato.

ILEI daŭre instigas siajn membrojn aboni *Eventoj* kiu donas la eblecojn cirkuleri novaĵojn ĉiun duan semajnon. Same oni invitas la kursgvidantojn abonigi al la lernantoj la revuon *Juna Amiko*. Sur la kampo de eksteraj rilatoj, ILEI provos starigi la kontaktojn kun eŭropaj instancoj kaj aliaj instruistaj neesperantistaj organizoj. La estraro alvokas ĉiujn kontribui al la koleghelpa kaso, kiu ebligas membriĝi al plurdekoj da nepagipovaj pedagogoj.

Al la eksredaktoro de IPR, *Márta Kovács* la estraro ankaŭ pere de IPR publike esprimas dankon pro la plurjara peza laboro. Al la nova redaktoro, *Jozefo Németh* sukceson!

Marija Beloševiĉ

Stipendio por infanoj

En la numero 1/80 de IPR la tiama kasisto de ILEI, *Olle Olsson*, skribis jene: De persono, kiu volas esti nekonata, la kasisto de ILEI ricevis monsumon por stipendio(j) al partoprenant(in)o de infankongreso aŭ simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas.

La donacinta persono atentigas pri tio, ke la mono estas akirita per diligenta kaj malfacila laboro kaj simpla vivo. La lernant(in)o devas esti diligenta kaj en aĝo de lernantoj en la deviga lernejo. La kasisto de ILEI atendas esperantlingvan raporton de la stipendiul(in)o post la partopreno de la infanrenkontiĝo kun respondo je ekzemple jenaj demandoj: 'Kio okazis dum la kongreseto? Ĉu vi trovis amik(in)on? El kiu lando li (ŝi) estis? Kio plaĉis al vi plej multe?' k.t.p.

La membro-instruist(in)o, kiu deziras peti stipendion por infano en sia kurso devas respondi jenajn demandojn:

1. En kiu infanrenkontiĝo vi intencas partopreni? (Kiam? Kie? Aranĝanto? Adreso?)
2. Kiu estas la nomo kaj adreso de la infano (li aŭ ŝi)?
3. Kiom da jaroj havas la infano?
4. Ĉu la infano bone povas konversacii en Esperanto kun samaĝuloj pri temoj rilatantaj al la infana aĝo?
5. Ĉu la infano estas diligenta kaj ne-riĉa?
6. Kiom kostas la restado de la renkontiĝo?
7. Kiom kostas la vojaĝo (tien kaj reen) al la renkontiĝo? (Prefere en svedaj kronoj aŭ germanaj markoj.)
8. Ĉu vi promesas sendi esperantlingvan raporton pri la renkontiĝo al la kasisto de ILEI en unu monato post la fino?

Dum la jarkunsido de la Sveda ILEI-sekcio la 28-an de majo 1994, *Olle Olsson* transdonis la taskon disdonadi la stipendiojn al la nuna kasisto de ILEI. En sia transdona prelegeto Olle Olsson diris interalie: „Dum la ILEI-kongreso en Italio en 1979 sinjorino *Erika Linz* kontaktis min, Olle Olsson, tiama kasisto de ILEI. Ŝi diris sekrete, ke ŝi intencis donaci monsumon por stipendioj al gejunuloj en la deviga lernejo, por tiel varbi novajn lernantojn kaj plibonigi la Esperantoscion. En 1979 mi vizitis ŝin en Vieno. Ni iris al banko, kie ŝi transdonis la monon, kiun mi en Svedio ŝanĝis al sveda mono kaj metis en *Skandinaviska Enskilda Banken* kaj *Skånska Banken*. Jen la du sumoj: 31.226:20 kaj 19.616:00 SEK. La kasisto, kiu havas membroliston de ILEI, disdonu la stipendiojn.

Mi interkonsentis pri la statuto, kiu estas publikigita en numero 1980/1 de IPR. La instruisto estu membro de ILEI. Li petas stipendiojn por gelernantoj en sia klaso. Por ke la mono ne baldaŭ elĉerpiĝu, 20 % de la rentumo ĉiujare estu donita al la kapitalo, 80 % iru al stipendioj. Se neniu petis stipendion, la tuta rentumo estu donita al la kapitalo.

Sinjorino *Linz* volis, ke neniu sciu, de kie la mono venis. Nur post ŝia morto mi rajtis diri tion. Tial mi la unuan fojon malkaŝis ŝian nomon dum la ILEI-konferenco en Norvegio. Mi povas aldoni, ke sinjorino *Linz* skribis tre interesan libron pri sia vivo en Brazilo, sub la titolo *Kion travivis aŭstria familio en la brazila praarbaro, kie ĝi laboris kiel koloniistoj*. Eldono: Gerlingen, Bleicher, 1985, 196 p.

La sumoj en la *Esperanto-Infankongresa Fonduso* nun estas: 88.472:40 kaj 454:34 SEK. La lasta stipendio iris al *Yuan Xiao Yan* el Hefei en Ĉinio. Mi ŝatus aldoni ion al la statuto en 1/80 de IPR:

- IPR ĉiujare informu la membrojn pri la ebleco peti stipendion.
- La petanto ricevu kopion de la statuto.
- La instruisto, kiu petas stipendion por iu(j) lernanto(j) ankaŭ informu, kiel la mono estu sendata: al la poŝtĝira konto de la instruisto, al lia/ŝia bankkonto numero xxx aŭ per bankĉeko al lia/ŝia adreso.
- Iu en la estraro de ILEI havu la taskon sekvi la evoluon de la stipendiulo. Ev. stip. raporto en *Juna Amiko*.

Dankante pro la honoro kaj ĝojo havi la eblecon dum ĉ. 18 jaroj disdoni la stipendiojn de *Erika Linz*, mi nun, en 1994 deziras, ke la hodiaŭa kasisto havu la saman oficon.

Olle Olsson, ekskasisto kaj Honora Membro de ILEI"

Do, estonte bonvolu sendi la petojn pri stipendioj minimume tri monatojn antaŭ la komenciĝo de la renkontiĝo al la kasisto de ILEI,

Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-242 94 HÖRBY, Svedio.

Postparolo

Redaktante la unuan numeron estis mia plej granda problemo la manko de materialoj. Ĉe la dua inverse, kelkaj materialoj devas transiri al la tria numero. Mi petas paciencon de la aŭtoroj (B. Vaha, M. Beloŝević, L. Szilvási, Cs. Németh k.a.). Post la apero de la unua numero mi ricevis dekon da gratuloj, kiuj donas al mi pli da (sed ne tro da) memfido. Alvenis ankaŭ du kritikoj, unu pro la ofta ŝanĝado de litertipoj, la alia proponis, ke mi ne transprenu artikolojn el aliaj revuoj. La unuan mi akceptas, la duan nur parte. La ĉefa tasko de IPR estas la dokumentado de la pedagogia laboro kaj la informado de la ILEI-anoj. Kompreneble estus bone, se la informojn ni povus ĉerpi nur el propraj fontoj, tio estas nia strategia celo. Al tiu celo mi petas la helpon de la kolegoj.

Jozefo Németh

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez, Calle Cerrito 1249, Barrio San Martin, AR-5000 Córdoba, (Córdoba).
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn.
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, ES-41080 Sevilla.
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59. HR-41000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibtoa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: d-ro A. M. Coimbra, Rua Colonel M. Leitão 20.1 Esq. PT-1700 Lisboa.
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RUS-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavĉar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Japanio: *vakas*
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent.

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Bašić (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (+32 3) 666 62 66.

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*.

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: *vakas*

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo, komputila retoadreso kaj telefaks-adreso post la Enhavo. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado. Regulaj redakciaj kunlaborantoj serĉataj, ekzemple por prizorgi iun rubrikon – prefere kun aliro al komputilo kaj kapablaj liveri materialon diske aŭ presprete.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-ĕŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.